

esperanto

JULIO-AŬGUSTO 1990 • 83-A JARO • N-RO 1015-1016 (7-8)

ISSN 0014-0635



- La plurlingvaj vortaroj de Lucjan Paff
- Ĉu naŭ novelaroj trovos sian publikon?
- Rebapte kaj rebate: daŭras la esperantigo-debato



Esperoj kaj ĉagrenoj de la faka kunlaboro

Enhavo

- 137 Movada organizo: Malfacilaĵoj de la faka agado:
La sperto de la praga skolo (Jiří Karen)
- 138 Faka agado: Por ekkoni la rondon familian (Edward Wojtakowski)
- 139 Leksikografio: Sur neŭtrala lingva fundamento (Lucjan Paff)
- 141 Faka agado: Koresponda konsilado (Michel Roulet); Por serĉantoj de spirita renesanco (Roland H. Hegen)
- 142 Renkontiĝoj: Timo je nordeco? (Sten Johansson)
- 143 Instruado: Helpkrio el Hungario (Ernö Csiszár); Carson subtenas Afrikon kaj Azion (Anne Neave)
- 144 Recenzoj: *La stultaj infanoj*, *La infano el la alta maro kaj aliaj rakontoj*, *Ŝtono de helpo* (István Ertl); *Sinjoro Jokasto kaj aliaj noveloj*, *Norda odiseado kaj aliaj rakontoj* (Georgo Kamaĉo); *Simha. Rakonto pri ĝojoj* (Zlatoje Martinov); *Sferoj 4, 5, 6* (A. Ananjin); *"O" kaj aliaj rakontoj* (Georgo Kamaĉo); *Abismo/Abyssos* (L. H. Knoedt); La serio "Voĉoj Kristanaj" (Philippe Cousson)
- 148 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 149 Lingvo: Venku libero kaj humuro (Hermano Bermanno, Rikardo Ŝulco); Nenio ajn komuna (A. Ŝalamon); Kopenhago, Pekino, ŝinkoj kaj sekso (Eskil Svane); Nesolvoj de neproblemo (Aldo de'Giorgi); Ne panaceo, sed normigo (Yamasaki Seikō); Literaĉo "r" estu arestita (M. E. Samanipur); Nova epoko, nova postulo (Oszkár Princz)
- 153 Foliume (pripresaĵaj raportetoj)
Nekrologoj
- 154 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 155 Kalendaro (internaciaj Esperanto-aranĝoj ĝis junio 1990)
- 156 Oficiala informilo

Vi trovos,

ke refloras ne nur la faka literaturo (kiel demandosignis la junia kovrilo), sed en pli larĝa kadro ankaŭ la faka agado ĝenerale. De kelkaj jaroj el Ĉinio blovas varma, kreskiga vento; nun la malfermiĝo de eŭropaj limoj verŝas bonvenan akvon sur la plugosulkojn. Dum jaroj la semoj tie dormis. Mi renkontis lastatempe, ĉe la Centra Renkontiĝo de GDREA, litovan muzikologon kaj orientgermanan telekomunikiston, kiuj de jaroj sopiris aktivi en siaj fakoj sed ne povis pro eksteraj malhelpoj. En ĉi tiu numero vi trovos pliajn novajn ŝosojn. Certe ne ĉiuj travivos la unuan vintron: ankoraŭ mankas al ni taŭgaj strukturoj kaj kultivistoj, por ne paroli pri la problemoj skizitaj en nia ĉefartikolo. Sed iom post iom kovriĝos la kampoj . . .

La kovrilo: En tiaj iom ĥaosaj kunsidoj ĉe la Universalaj Kongresoj (ĉi tie: Varsovio, 1987) okazas la ĉefaj provoj starigi internacian fakan kunlaboron. Interkongrese daŭrigi la laboron estas tamen pli granda defio.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj.
Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 48,75; US\$ 23; GM 43; enoj 3600; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1540, 1/2 p. 850, 1/4 p. 470, 1/8 p. 260, 1/16 p. 150. Movada rabato 50%. Eksterakvtilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefakso: +3110 436 17 51.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la CO: vakas.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (01) 542 0302; telefakso (01) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdańska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarckenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Osmo Buller, Suksitie 4 B 15, SF-93400 Taivalkoski, Finnlando; tel. (988) 51 003; telefakso (988) 51 681.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, B-2520 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, junularo): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II.3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-600, Korea Respubliko; tel. (02) 646 5413; telefakso (02) 275 0633.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Štimec, Nova Ves 87, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio; tel. (041) 42 92 51; telefakso (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Edward Symoens, Putsesteenweg 131A, B-2180 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (03) 666 62 66.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): s-ro Jan Koszmaluk, 8 Villa Stendahl, F-75020 Paris, Francio; tel. (1) 43 66 63 47; telefakso (1) 43 66 09 92.

Movada organizo:

Malfacilaĵoj de la faka agado: La sperto de la praga skolo

En 1980 ni fondis literaturan sektion de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La sekcio intencis informi la esperantistojn pri la nacia literatura kreado kaj ne-esperantistan publikon pri la originala literaturo en Esperanto. Ni volis popularigi la verkojn de niaj aŭtoroj, kultivi Esperanton kiel literaturan lingvon kaj pridiskuti la tiutemajn problemojn, apliki Esperanton prelege kaj konversacie. Ni laboris diversmaniere.

a. Ni prezentadis al esperantista publiko nian Esperanto-verkistojn kaj tradukistojn (J. Kořínek, J. Vondroušek, K. Píč, E. Urbanová, E. Seemanová, O. Kníchal k.a.) Tiuj aŭtoroj instruis nin pri siaj verkoj kaj labormetodoj kaj prezentis artisme siajn originalaĵojn.

b. Ankaŭ verkistoj (poetoj), kiuj publikigas en la ĉeĥa lingvo siajn verkojn kaj kiuj lernis Esperanton, partoprenis la programon (F. Kožík, J. Rumler, F. Lazecký, J. Karen, Č. Vidman, L. Hodáčová-Jirsová). Lastatempe ni invitadis ankaŭ komenkantajn aŭtorojn, kiuj ankoraŭ ne publikigis, sed intencas lerni kaj uzi Esperanton (Jar. Červenka k.a.).

c. Al esperantista publiko ni prezentadis aliajn ĉeĥajn aŭtorojn, kiuj simpatias kun Esperanto (merita artistino J. Urbánková, O. Dub, M. Procházková k.a.). Al ĉiu aŭtoro ni prezentis literaturan medalon, kaj ni deklamis liajn aŭ ŝiajn verkojn en la ĉeĥa kaj en Esperanta traduko.

ĉ. Ni invitis en nian rondon ankaŭ lingvofakulojn, kiuj prelegis pri lingvistikaj kaj interlingvistikaj problemoj (d-ro V. Černý, d-ro Sgall, Dc. Skalička k.a.). Ni organizis du renkontigojn de la sekcianoj kun lingvistoj el pragaj altlernejoj. Partoprenis ankaŭ doktoro de la sciencoj Detlev Blanke el GDR.

d. Verkistoj, membroj de Asocio de Ĉeĥaj Verkistoj, prezentis Esperanton en siaj renkontigoj kun legantoj en diversaj urboj. Ni invitis lokajn esperantistojn al tiuj prezentoj kaj ili povis demandi la aŭtoron pri Esperanto kaj ĝia literaturo.

e. Ni provis organizi seminarion por komencantaj tradukantoj, sed bedaŭrinde la aranĝo ne sukcesis pro malintereso de la esperantistoj kaj ankaŭ pro tio, ke ĈEA ne propagandis tiun

aranĝon. Surbaze de tiu ĉi seminario tamen naskiĝis la ideo traduki Esperanten antologieton el la aktuala ĉeĥa poezio – Esperanta traduko kun paralela originalo.*

f. Ni planis renkontiĝon kun eksterlandaj esperantistoj vizitantaj Pragon, sed tiu laborformo ne sukcesis. Ni organizis nur du aranĝojn kun gastoj el Hungario.

g. La rezultojn de nia aktivado ni publikigis parte en *Paco*, ĉeĥa eldono, kaj ĉefe en literaturaj suplementoj al *Paco* (32-paĝaj kajeroj, kiuj sume reprezentas ĉirkaŭ 200 paĝojn).

Post dekjara aktivado nia literatura

la eseo de J. Rumler *Abunde kaj redunde*, estis malfavore akceptita ne nur de niaj esperantistoj, sed ankaŭ en eksterlando. Sed tamen ni devas konstati, ke tiu ĉi diskutado famigis nian "Literaturan skolon" pli ol povis fari la aliaj propagrimedoj, ĉar vere pro skandaligo estas pli granda intereso ol pro serioza laboro.

Alia kaŭzo: malfacilas krei unuecan kolektivon el artistoj de la sama speco, t.e. nur el poetoj. Al ni mankis prozistoj, dramistoj kaj eseistoj. La amasojn allogas ne la poezio, sed la kanzonoj. Grupo nomita "Barbuloj", kiu muzikis kaj kantis, aŭ la artistoj kantantaj (Smyčka kaj Vích) kompreneble sukcesis pli ol ni. Tio respegulas ne nur la situacion en nia lando, sed validas por la tuta homaro. Aŭskulti kantistojn kaj muzikistojn – ĉe tio oni ne bezonas koni Esperanton por ĝui la programon. La praktiko montras, ke



Se la loka literatura agado estas pena, tiu sur internacia nivelo estas eĉ pli kaprompa. Tibor Sekelj, la fondinto de Esperantlingva Verkista Asocio, diskutas kun Perla Martinelli la agadon ĉe la Internacia PEN-Kongreso en Lugano, 1987. La Esperanta aliĝpeto malakceptiĝis.

sekcio ĉesigis sian laboron. Kio kaŭzis tiun paŝon?

Unue, ne ĉiam enhave kaj teme ni kaptis la intereson de la esperantistoj. Ĉefe nia tro teoria diskutado pri specifaj problemoj de Esperanto kiel lingvo literatura, temaro prezentita en

sukceson povus atingi kolektivo, en kiu aktivas muzikisto, kantisto, pentristo, recitanto, aktoro-solisto. Grupo, en kiu oni verkas poezion, prozon, eseon, dramon kaj kanttekstojn, jam havas pli da ŝanco ol kolektivo kunmetita el poetoj.

Ni estu sinceraj – bedaŭrinde multaj pensas, ke nur ili estas talentaj kaj verkas valore. La interhomaj rilatoj postulas de la anoj, ke ili agnosku ne nur sin mem, sed ankaŭ la aliajn. Ĉiu verkisto havas sian propran publikon: iu la profane vulgaran, alia

*Tia kolekto lastatempe iĝis havebla de la Libroservo de UEA: *Tute eta nekompleta antologio el la nuntempa ĉeĥa poezio* de Jozef Rumler, prezo: 6,00 gld.

la popularan, tria la fakan, kvara la literaturan. Se oni ne respektas tion kaj reduktas la programon al nur unu arta nivelo, la grupon minacas disfalo. Ĉu ni estas ĉiuj toleremaj kaj komprenemaj, ĉu ni scias diri nian kritikon ĝentile, ne akre, ĉu ni volas konsili – aŭ nur arogante kritiki?

Alia problemo – la kolektivo ne povas esti kreita el nur unu aĝgrupo. Estas konate, ke nur du aĝkategorioj havas tempon por viziti aranĝojn kaj partopreni en kulturaj entreprenoj: junularo (studentoj) kaj maljunuloj-pensiuloj. Mankas do la generacio mezaĝa, la plej produktiva. Ĝian tutan tempon konsumas la profesiaj kaj familiaj problemoj, lige kun financaj zorgoj. Nur malmultaj el tiu ĉi kategorio aktivas en niaj vicoj. La kunlaboro de junuloj kaj pensiuloj estas fakte malfacila, ĉar la unuaj rigardas la estontecon kaj la maljunuloj la pasintecon. La diferencoj inter generacioj estas nesupereblaj.

Fakuloj kaj hobiistoj

Oni ne povas neglekti la fakton, ke influas la situacion ankaŭ la konflikto inter amatoroj, literaturaj hobiistoj, kiuj interesiĝas pri la literaturo nur supraĵe kaj postulas de ĝi nur amuzon, kaj la profesiuloj, kiuj longe studis la aferon, profunde pripensas la problemaron kaj postulas de la aliaj seriozon. Tio okazis ankaŭ en nia situacio. La laikoj (kaj kiu ne verkas poemojn en Esperanto! Kaj kanzontekstojn!) perdis intereson pri fakaj diskutoj, kaj la profesiuloj restis sen publiko. Gravas ankaŭ tio, ke ekzistas diversaj niveloj de kono de Esperanto. Se oni parolas fake, jam multaj ne interesiĝas pro la simpla motivo, ke ili ne komprenas la enhavon de la prelegoj, diskutoj, programoj. Sen altigo de la lingva kulturo de esperantistoj, la originala kulturo Esperanta havas negrandajn ŝancojn. Ĉiu esperantisto faras preskaŭ ĉion: li instruas, organizas, verkas, tradukas, kantas ktp., kaj tio disipas la fortojn de la personeco, kiu poste ne povas fari ion perfekte kaj profunde. Anstataŭ kunlaboro de la specialigitaj fakuloj naskiĝas fatala malakordo inter nefakuloj, kiuj tamen konas ĉion pli bone ol la aliaj.

Tiun analizon de la kaŭzoj ni povus daŭrigi, sed jam tio sufiĉas. Mi pensas, ke tiu analizo povas esti utila ne nur por laboro literatura kaj artisma, sed ankaŭ por aliaj sferoj de nia por-esperanta agado.

Jiří Karen (Ĉeĥoslovakio)



Faka agado:

Por ekkoni la rondon familian

Genealogio estas scienco, kies celo estas esplorado pri la deveno kaj parenceco de familioj aŭ gentoj. Kutime homoj konas la naskiĝlokojn kaj naskiĝdatojn nur de siaj gepatroj kaj geavoj, sed kelkaj homoj sukcesas trovi informojn pri pli multaj, eĉ pri 1000 antaŭuloj. En ĉiu generacio la nombro de antaŭuloj duobliĝas:

la 1-a generacio de antaŭuloj

– 2 (gepatroj)

la 2-a generacio de antaŭuloj

– 4 (geavoj)

la 3-a generacio de antaŭuloj

– 8 (prageavoj)

la 4-a generacio de antaŭuloj

– 16 (praprageavoj)

la 10-a generacio de antaŭuloj

– 1024 antaŭuloj ktp.

Oni povas prilabori genealogian tabelon (arbon) de sia gento. Gento estas la posteularo de unusama praulo. Antaŭulo vivinta ĉ. 1750 povas havi ĉ. 200-400 nuntempe vivantajn posteulojn en viraj linioj uzantaj la gentan nomon kaj kelkajn milojn da posteuloj en virinaj linioj portantaj aliajn nomojn. Kutime oni konstruas genealogian arbon nur en viraj linioj.

Ĉiu gento rajtas posedi gentan blazonon. Blazonoj devas diferencii unu de la alia. La scienco pri blazonoj nomiĝas heraldiko. Ekzistas kelkcent miloj (eble eĉ milionoj) da blazonoj en la mondo.

Blazonojn posedas familioj burĝaj, kamparanaj kaj nobelaj (ankaŭ urboj, episkopoj, papoj). Ĉiu gento, kiu ankorau ne posedas blazonon, rajtas ĝin prilabori kaj uzi por ornami vizitkartojn, leterpaperojn, invitilojn ktp.

Multaj gentoj estas internaciaj. Nuntempe vivantaj idoj de la komuna protopatro vivinta antaŭ kelkcent jaroj loĝas en diversaj landoj kaj parolas diversajn lingvojn. Ili povas komune esplori sian historion, organizi gentajn muzeojn, gentajn renkontiĝojn, eldonadi gentajn gazetojn. Esperanto povas esti tre utila por tiu celo.

Inter esperantistoj estas jam multaj fervoraj genealogoj. Ili projektas fondi Esperantistan Genealogian kaj Heraldikan Federacion, kies celo estas informi esperantistojn pri la genealogio, kaj genealogojn pri la uzebleco de la internacia lingvo por genealogaj esploroj. Oni planas eldonadi en Esperanto genealogian bultenon, organizi genealogiajn seminariojn kaj eldonadi genealogian fakliteraturon en Esperanto. Pliajn informojn donas:

– S-ro Charles M. Hall, P.O. Box 21346, Salt Lake City, Utah 84121, Usono;

– S-ino Ilona György, Széchenyi ut. 18, H-2230 Győmrő, Hungario;

– S-ro Edward Wojtakowski, Box 312, PL 50-950 Wrocław 2, Pollando.

Sur neŭtrala lingva fundamento

Dum la 66-a Universala Kongreso de Esperanto en Brazilio okazinta en 1981, mi prelegis en Esperantologia Konferenco pri la ebleco de disvastigo de Esperanto "praktike kaj sendolore". Poste mi ricevis kelkajn leterojn kun paroloj de inspiro, interalie de G. Maertens, Humphrey Tonkin, Flóra Szabó-Felső kaj S. MacGill. Ankaŭ en Pollando la Universitato de Lodzo publikigis mian prelegon en la libro "Internacia Lingva Komunikado" en 1983.

Nun post multaj jaroj de diligenta laboro kaj lingvistika esplorado mi verkis du unuajn seriojn de *Turista universala komprenigilo* kaj *Fundamentaj vortoj de l' homaro* en 7 lingvoj: angla, franca, germana, Esperanta, hispana, itala kaj portugala.

Zamenhof diris: "Ĉio, kio rezultigos unu solan plian uzanton de la lingvo, estas pozitiva kaj tial subteninda," kaj alifoje parolante en Cambridge li ripetis: "... Ĉio, kio neniun ofendante, povas krei pacan ponton inter la popoloj, tio sole ne devas esti evitata timeme en niaj kongresoj, sed kontraŭe ĝi devas esti la esenco de niaj kongresoj." Por plenumi ĉi tiun saĝan indikon ni devas antaŭ ĉio koncentri niajn fortostreĉojn en la preparo kaj kreado de allogaj kaj tre praktikaj eblecoj de Esperanto en la ĉiutaga vivo. Tio estas, ni devas eniri ĉiujn sferojn de la internacia vivo kaj precipe:

1. mondan turismon kaj vojaĝojn,
2. lernejojn de ĉiuj niveloj (instruadon de fremdaj lingvoj),
3. komercajn rilatojn inter landoj,
4. internaciajn organizaĵojn, precipe neregistarajn kun anoj en multaj landoj, kaj ĉiujn mondajn organizaĵojn de fakuloj, specialistoj kaj scienculoj.

Antaŭ ĉio ni profitu ĉiujn okazojn, kiuj nun ekzistas por la disvastigo de Esperanto.

Nun, dum la lastaj 30 jaroj, pro la tre grava evoluo de ĉiuj specoj de la komunikiloj tra la landoj de la terglobo, okazis *vera eksplodo de turismo* – urĝa bezono de grandamasoj eliri el la malvastaj limoj de sia lando por viziti kaj ekkoni la vivon de la antaŭe "fremdaj" popoloj. Nur en Eŭropo (sen Rusio) en la jaro 1979 pli ol 260 milionoj da turistoj vojaĝis al 32 landoj, parolante 40 diversajn naciajn lingvojn. Dum la lastaj 10 jaroj, sole en la landoj de Okcidenta Eŭropo,

ĉiujare pli ol 200 milionoj da homoj pasigas sian libertempon malantaŭ aliaj, nepatrujaj limoj.

Tiu ĉi grandega migrado estas nuntempe kiel bruaj homaj riveroj, kiuj enfluas la tutmondan oceanon. Sed la gutoj de ĉi tiuj riveroj ne unuiĝas kun la akvo de la oceano. La nevidebla, nedetruibla kiraso de la lingvo izolas perfekte ĉiun individuon. La malbeno de la turo de Babelo daŭras ankoraŭ post miloj da jaroj.

Por faciligi al la milionoj da turistoj interkomunikiĝi, multaj nacioj eldonas nenombreblan kvanton da gvidlibretoj kun kelkaj centoj da frazoj kaj vortoj

Esperanto povas elvoki
surprizajn fortostreĉojn
ĉe iuj homoj, ofte
izolitaj kaj nekonataj.
Polo-argentinano
Lucjan Paff dediĉis sin
al vortarverkado.
Ĉu iu tamen utiligos
la rezultojn?

elektitaj hazarde de improvizaj kompilistoj. Estas evidente, ke ĉi tiuj centoj da miloj da libroj servas nur la eldonistojn mem, ĉar inter la turistoj ne estas multaj geniuloj kapablaj lerni iun nacian lingvon en du semajnoj aŭ du monatoj.

Male, la unika lingvo, kiun ĉiu klera persono povas lerni en unu monato, estas Esperanto, almenaŭ ĝian esencan gramatikan parton, kiu estas mirinde kondensita en nur 16 reguloj de la Fundamento. Tio kreas grandegajn eblojn por la popularigo de Esperanto inter la milionoj da homoj, kiuj serĉas senespere iun ajn helpilon por komunikiĝi.

Tio estas la esenca ideo de la kompilo de *Turista universala komprenigilo*. La grandega amaso de la multlingvaj turistoj kaj vojaĝantoj trovas en siaj manoj simplan, sed tre efikan helpilon por komunikiĝi reciproke kun ĉiu klera homo de la tuta mondo.

La serio de la *Turista Universala Komprenigilo* entenas pli ol 4400 vortojn kaj preskaŭ 2300 frazojn aranĝitajn laŭteme en 40 diversaj grupoj. Ĉiu TUK pritraktas 6 naciajn lingvojn kaj Esperanton. Ekzemple la unua volumo enhavas: *English – Français – Deutsch – Esperanto – Español – Italiano – Português*.

Tiu ĉi unua fundamenta volumo estas jam preparita por eldono fare de iu interesita landa Esperanto-asocio aŭ alia granda eldon-firmao, en ĉiu lando, kiu uzas nacie iun lingvon el la supre menciitaj. La regulo estas, ke ĉiuj aliĝintaj landaj asocioj de UEA havas la rajton eldoni la unuan serion de TUK kun sia propra lingvo (anstataŭ la portugala) kaj organizi vendadon en sia lando kaj ekstere.

Unu aĉetita ekzemplero de TUK en iu nacia lingvo, kun paralela traduko en 5 ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj Esperanto, servas por rilatigi tutmonde iun ajn turiston al ĉiu alia posedanto de TUK: ĉar ĉiuj naciaj TUK estas ligitaj per la internacia lingvo, kiu formas la interlingvan bazon de la monda interkomunikado kaj kompreniĝo.

La plej grava faktoro por eldoni ĉiujn naciajn versiojn de TUK estas, ke la kostoj kaj elspezoj de la eldonoj povos esti pagataj *totale* per la komercaj reklamoj de lokaj turismaj entreprenoj kaj vojaĝagentejoj, restoracioj, hoteloj, butikoj, firmaoj ktp., kies anoncoj devas esti renovigataj en ĉiu eldono kaj ĉiujare. Ĉi tiuj informoj kaj avizoj de komercistoj, kiuj proponas siajn produktojn kaj varojn al milionoj da turistoj ĉiujare, estos transdonitaj *senpage* kune kun la *Turista Universala Komprenigilo*.

En ĉi tiu dua volumo de TUK (en ĉiuj grandaj urboj) devas esti publikigitaj ankaŭ la adresoj de la plej gravaj, kulturaj institutoj de la urbo kiel muzeoj, monumentoj, historiaj konstruaĵoj kaj kuriozaĵoj turismaj. Post tio devas sekvi *ĉiuj pagitaj komercaj anoncoj*. En ĉi tiu maniero la turisto ricevas *senpage* la helpilon de rekta komunikiĝo kaj tre valorajn informojn.

Mi proponas tiun ĉi verkon al ĉiuj landaj asocioj kaj speciale al la internacia asocio Monda Turismo, kiu povus certigi kunlaboron en tiu specifa kampo.

La dua, sed pli grava serio nomiĝas *Lingva Universala Komunikilo* (LUK) aŭ pli precize *Fundamentaj vortoj de l' homaro*. Ĝi naskiĝis dum mia militservo en la Dua Mondmilito, kiam mi observis, kiajn enormajn obstaklojn

formas la reciproka miskompreno por kunordigi 13 diversajn armeojn en la batalo kontraŭ la komuna malamiko. La vortaro enhavas ĉirkaŭ 14 000 plej ofte uzatajn vortojn, laŭ statistikaj kalkuloj faritaj en 5 grandegaj sciencaj esploroj.

La studado de la ofteco de vortuzado komenciĝis antaŭ pli ol 70 jaroj kaj la plej notindan studon por la angla lingvo faris Edward Thorndike en la unua fama verko *Teachers Word Book of 20 000 words*, eldonita en 1932. La

“Mia verkaro . . . tre malsamas al ĉiuj ĝis nun eldonitaj vortaroj Esperantaj kaj ankaŭ al la plimulto de la naciaj.”

plej granda verko de kompilado por la lingvo germana, *Häufigkeitwörterbuch der deutschen Sprache*, enhavas 79 000 vortojn kalkulitajn de 300 fontoj kun preskaŭ 11 milionoj da vortoj. Por la lingvo franca ni havas *French Word Book* de George Vander Beke kaj por la lingvo hispana *Graded Spanish Word Book* de Milton A. Buchanan. Surbaze de tiuj enormaj verkoj s-ino Helen Eaton kompilis *An English-French-German-Spanish Word Frequency Dictionary*, kiu prezentis la unuajn 6 500 vortojn plej ofte uzatajn en ĉiuj 4 lingvoj.

Tiuj ĉi fundamentaj vortoj formas la bazon de mia verko.

Por ampleksigi la fontojn de la serĉado ekster la eŭropaj lingvoj, mi trovis por la japana *The 6-language dictionary* eldonitan de The Japan Times en 1956, kiu enhavas 10 000 elektitajn vortojn, kaj por la lingvo ĉina *Vocabulaire de Base du Chinois moderne, Chinois-Français* eldonitan en Parizo. Tiu ĉi verko enhavas nur 3 218 vortojn la plej ofte uzatajn, selektitajn de Ŝtata Komisiono por la reformo de la ĉina lingvo. Fine mi trovis version anglan de la verko *Essential Russian Dictionary*, kiu enhavas ankaŭ nur 3 000 vortojn, la plej oftajn de la lingvo rusa.

Apogante min sur tiuj ĉi grandaj leksikologiaj verkoj kaj sur kelkaj aliaj pli freŝaj mi preparis *Fundamentaj vortoj de l' homaro*. La tuta verko estas bazita sur la rezultatoj de statistikaj esploroj de pluraj lingvistoj, kies konkludoj resumiĝas jene:

A. Pli ol 80 procentoj de la totala nombro de la vortoj uzataj en normalaj tekstoj, en la ĉiutaga interparolado kaj korespondado, troviĝas en la *unua milo* de la fundamentaj vortoj de ĉiu lingvo.

B. En la *dua milo* troviĝas nur 8 ĝis 10 procentoj, proksimume 4 procentoj en la *tria milo* kaj en la *kvara* kaj *kvina* nur po 2 procentoj de esencaj vortoj.

C. Per la unuaj 4 000 vortoj selektitaj laŭ ofteco de uzado, oni kovras 95 procentojn de ĉiuj normalaj tekstoj, dialogoj kaj korespondado. La *duaj* 4 000 kontribuas nur 2-3 procentojn kaj ĉiuj el la restantaj centmiloj da vortoj ne pli ol 1 ĝis 2 procentojn.

1. enkondukon al Esperanto kiel bazo lingvistika inter ĉiuj lingvoj naciaj;

2. vortaron *laŭ la alfabeto de unu el 6 lingvoj* plej uzataj en la mondo, kun la signifo Esperanta ĉiam en la mezo kaj samtempa traduko en 5 aliaj naciaj lingvoj

3. Post realigo de 7 vortaroj de 7 lingvoj estos eble fari rapide 30 malgrandajn *trilingvajn* vortarojn kun 2 lingvoj naciaj kaj Esperanto ĉiam en la mezo.

Tiel ĉiu aro de 6 lingvoj naciaj estos aŭtomate ligita kun aliaj volumoj pere de Esperanto.

Mi proponas al ĉiuj asocioj Esperantaj, precipe tiuj en Eŭropo, la



Eble la plej granda faka sukceso de Esperanto troviĝas en la kampo de turismo. Sub la gvido de A. Grzębowski (meze), la pola Esperantotur kreskis en entreprenon kun 80 oficistoj.

Multaj vortaroj ankaŭ de Esperanto estas kompilitaj sen iu ajn scienca fundamento, sinapogante nur sur la ekzemploj jam pretaj de aliaj naciaj lingvoj. Mia verkaro estas la rezulto de daŭra fortostreĉo dum dekoj da jaroj kaj tre malsamas al ĉiuj ĝis nun eldonitaj vortaroj Esperantaj kaj ankaŭ al la plimulto de la naciaj. *Lingva universala komunikilo* entenas ĉirkaŭ 7 000 vortojn, ĉiun markita per la numero de tiu milo, al kiu ĝi apartenas. Krom tiuj fundamentaj vortoj enestas ankaŭ eble ĉiuj verbaj radikoj, kiuj kune kun la aliaj formas vortaron de ĉirkaŭ 14 000 vortoj. Tiuj estas la fundamentaj vortoj kaj antaŭ ĉio necesaj por la studado kaj uzo de iu ajn lingvo.

Ĉiu volumo de LUK havas 3 partojn:

ellaboradon kaj presadon de tiaj trilingvaj vortaroj kaj laŭ ĉi tiu sistemo eniri kun Esperanto en la lernejojn de la mondo. Se mia malsana koro permesos al mi laboradi ankoraŭ dum kelkaj jaroj, mi kune kun 1 aŭ 2 kunlaborantoj diligentaj por ĉiu nacia lingvo povus ellabori pli ol 1000 *trilingvajn* vortarojn. Dum 3 aŭ 4 jaroj oni povus pretigi vortarojn por la 45-50 plej uzataj lingvoj naciaj en la komunikado de l' homaro kaj tiel ebligi al ĉiu klera homo komunikiĝi kun iu ajn alia en iu ajn lando.

Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la plej rapida disvastigo de Esperanto kaj povus helpi kiel kunlaborantoj en ĉi tiu grandega laboro, skribu senpere al:

Lucjan Paff

Monteverde 3955, 1636 Olivos,
Buenos Aires, Argentino

Faka agado:

Koresponda konsilado

Kun pluraj eksterlandaj psikologoj kaj psikoterapiistoj (el Bulgario, Litovio, Norvegio, Francio, Germanio . . .), mi intencas fari novan fakan asocion kadre de UEA, kie ekzistas nenio asocio pri psikologio (ekzistas pri medicino kaj filozofio, sed ne pri psikologio).

Krom faciligi kontaktojn inter la psikologoj tra la diversaj landoj, ni volus ankaŭ proponi al la esperantistaro bonvolan psikologian *helpservon perkorespondan*.

Uzante ĝin, persono, kiu serĉas psikologian helpadon aŭ psikoterapion, povos elekti kaj kontakti eksterlandan esperantistan fakulon.

Por scii, ĉu la kreota asocio kaj la propono pri helpservo interesas la esperantistaron, mi petas la legantojn plenigi kaj resendi al mi la jenan anoniman demandaron.

1. Ĉu vi iam pripensis uzi unu el la fakaj helpservoj?

Ekzemple:

- telefoni al "S.O.S. Amikeco"
- renkonti psikologon aŭ psikoterapiiston
- ktp.

(jes/ne)

2. Se vi havus rilatajn problemojn, aŭ psikologiajn problemojn, aŭ pli simple, se vi volus pliprofundigi vian konon de via personeco, ĉu vi serĉus la *helpon de fakulo*?

(jes/ne)

3. Kutime la persono, kiu sekvas psikoterapian kuracadon, renkontas sian terapiiston kaj parolas kun li aŭ ŝi.

Se vi bezonus tian helpon, ĉu vi akceptus *alian helpsistemon*?

(jes/ne)

4. Ĉu vi akceptus *korespondan* helpadon de via helpisto?

(jes/ne)

5. Ĉu vi ŝatus korespondi kun *alilanda* psikoterapiisto?

(jes/ne)

6. Se ĝi ekzistus, ĉu vi ŝatus kontakti *internacian esperantistan psikoterapian servon*?

(jes/ne)

7. Se tio eblus, ĉu vi pensas, ke *Esperante* korespondi kun alilanda psikoterapiisto povus helpi vin?

(jes/ne)

Bonvolu sendi viajn respondojn al:

Michel Roulet
41 rue de la Francherie
36500 Buzançais, Francio
tel. 54 84 20 36

Se respondinte tiun demandaron vi deziras ricevi pli multe da informoj pri la kreota esperantista asocio de psikoterapiistoj, aŭ se vi volas kontakti alilandan helpiston, skribu al la sama adreso. Bonvenaj estas ankaŭ reagoj kaj kunlaborproponoj de psikologoj, psikoterapiistoj kaj similaj fakuloj.

Por serĉantoj de spirita renesanco

Humanismo ĝenerale kompreniĝas kiel renesanco de la antikva spirito, renovigo de anktikvaj kulturvaloroj, memkonscia homeco. Ĉi tie mi prezentas alian bazon, ne por kulturi la antikvajn lingvojn, sed por montri, ke necesas nova renesanco, ĉi-foje per la lingvo Esperanto. La vojo ĝis profunda ekkono ne estis glata. Mi naskiĝis inter ambaŭ mondmilitoj en dulingva medio, kaj la travivita milito kun ties sekvoj estis elirpunkto por tiu dorna vojo.

Jam frue mi spertis malfacilaĵojn kaj disdividitecon pro la dulingveco, al kiu helpis ĉefe la politiko, akriĝante la fremdiĝon ĝis malamikaj sentoj inter ni germanoj kaj ĉeĥoj, spite de multaj amikaj rilatoj. Kreskante mi cetere sentis antipation kontraŭ la diktatora sintenado flanke de ŝtato, lernejo, eklezio kaj "gviduloj" ĝenerale: ĉiuj posedis laŭpretende la absolutan veron kaj sciis, kio por ni simpluloj estas bona kaj malbona, kion ni devas fari kaj lasi. Propra pensado ne estis petita. Estante infano el laborista familio, mi ne havis la necesan klerecon por vorte esprimi tion; mi estis edukita obeema.

La kruela milito efikis al sentema infano des pli kruela, kaj aldoniĝis la

Meminstruita filozofo
Roland Hegen volas
restarigi Esperanto-
Centron Humanismo:
"Povas ekzisti multaj
diversaj mondo-
konceptoj, sed ekzistas
nur unu humaneco."

timigo de katolika instruo pro minaco per inferaj torturoj, se la homo ne obeas! Demandoj pri tio, "ĉu povas ekzisti dio, kiu permesas tiajn kruelaĵojn", kaj similaj, estis frakasitaj kun la indiko, ke la homo ne rajtas pridubi la kredon. Feliĉe mi posedis profundan memkonscion, min konservantan kontraŭ ĉiuj kuratorecaj provoj. Ne povante min esprimi, mi silentiĝis kaj komencis legi, por mem eltrovi, kio veras kaj malveras. Mia unua memaĉetita libro post la milito, post la deviga forlaso de la naskiĝlando, estis malmultekosta (unu marko), sed tre altvalora, kaj staras ankoraŭ nun inter miaj libroj: *Pri homa libereco*.

Mia plej granda deziro, studi natursciencojn kaj filozofion, ne plenumiĝis pro la milito kaj longdaŭra malriĉeco. Plej kurioze, poste, kiam tio ŝajnis ebla, mi ne rajtis, ĉar estis permesite nur al kristanoj, kio mi intertempe ne plu estis. Tiel komenciĝis por mi profesi-flankiga meminstruo, kion mi hodiaŭ ne bedaŭras, kvankam tiu vojo estis dorna. Sendepende de ĉiuj skoloj mi memstare evoluigis mian komprenon pri la mondo kaj vivo kaj konvinkiĝis, ke nur interhoma kompreniĝo, ne disputado taŭgas homare.

Jam dum la milito mi spertis la problemaron dum "interparolado" kun militkaptitoj el diversaj nacioj, kaj subkonscie mi sentis tiun mankon, kiu sufiĉe ofte kaŭzis miskompreniĝon, eĉ malamikiĝon, ekz. kiam greka militkaptito kelkfoje montris al mi sian ĉagrenon kaj insultis min per torento da fremdaj vortoj. Tio certe ne eblus, se ni parolus komunan lingvon. Kiam venis okupadaj trupoj rusaj, ankaŭ mi devis helpi en la ordonita konstruo de barakoj por la soldatoj, kaj tie mi spertis neforgeseblan momenton, kiam mi perdis mian timon antaŭ la "bolŝeviko", enradikiĝintan pro la nazia influo: tiu momento estis por mi plej fundamenta, ĉi-decida! Rusa oficiro diris al mi tagmeze: "Venu, knabo! Vi laboris diligente, vi nun manĝu!" kaj

honte mi memoris la momenton antaŭ kelke da semajnoj, kiam mi senhelpe vidis germanan gardiston bati per la pafilkolbo rusan militkaptiton, kiu volis nur preni de la tero pecon da terpomo pro malsato! Tiu rusa oficiro forviŝis ĉion instruitan, ĉar mi ekkonis, ke ĉie ekzistas homoj, kiuj povas paroli, ĝoji, malĝoji, larmi . . .

Sekvis plurjara kleriĝado, ĉar mia katolika fono ekkontraŭis mian pensadon, des pli, kiam mi eksciis, ke la pastro en la preĝejo parolis favore al la fuĝintoj kaj forpelitoj, sed ĉikanis familion konatan al ni. Mi havis alian komprenon pri humaneco kaj libereco; de tiam mi evitis la preĝejon, kaj kiam alia pastro al mi diris, ke "la homo estas laŭnature malbona", mi forlasis la eklezion kaj sentis liberiĝon de tiu premo. Poste mi trovis konvenan hejmon en la liber-religia komunumo.

Ekkono de Esperanto

En tiu tempo venis la momento, kiam mi eksciis pri Esperanto, kaj la konekso al ĉiuj spertoj ŝtataj, militaj, lernejoj, ekleziaj kaj edukaj salte atakis min. Mi ekkomprenis la rilatojn inter humaneco, interhoma kompreniĝo kaj paco. Sekvanta profundigita kaj ampleksigita scienca esplorado konvinkis min, ke necesas certaj ŝanĝoj en la homaro, se ĝi volas heredigi nian teron pura por la sekvantaj generacioj. Tio koncernas ne nur la materian staton, sed precipe la spiritan, ekzemple anstataŭigon de la nocio potenco per pli pozitiva respondeco k.a. Plej necesa por la kunvivado estas tio, ke ĉiuj mondokonceptoj maturiĝu por ekkoni, ke ĉiu el ili posedas nur por si mem la veron, kaj ne rajtas rigardi la aliajn kiel malverajn: povas ekzisti multaj diversaj mondokonceptoj, sed ekzistas nur unu humaneco! Mia esploro rezultigis unuan traktaton, *Ĉu batalo por ekzistado aŭ solidareco?*, teoria bazo por la skizita verko *De Kredo al Scio*, kiu estos havebla por interesitoj kopie post korektiĝo, ĉe la restarigita Esperanto-Centro Humanismo, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein, FR Germanio.

Mi intencas daŭrigi la pli fruan laboron de la 70aj jaroj kaj eldoni serion de malgrandaj kajeroj, kiu servos kiel "humanisma biblioteko". Tiucele mi esperas trovi la tiamajn geamikojn kaj kolekti la interesitojn en Internacia Humanisma Esperanto-Asocio. Tio tamen dependas de la bezono reala, kaj mi ĝojos pri ĉiu interesiĝo kaj reago.

Roland H. Hegen (FR Germanio)



*Solène Gaspard kiel Mezulina:
sukcesa premiero de Teatro Krizalido.*

Renkontiĝoj:

Timo je nordeco?

En la sveda urbo Västerås, en tre konvena kultura domo kreita el malnova bierfarejo sur la bordo de la "Nigra Rivero", okazis de la 24a ĝis la 27a de majo 1990 la tria Kultura Esperanto-Festivalo. Juna tradicio kun juna etoso, organizita de junaj homoj, sed kun diversaĝaj ĉeestantoj. Bedaŭrinde nur, ke la altaj latitudoj ŝajne fortimigas la amasan publikon! Ĉi-foje apenaŭ centoj da esperantistoj el dek unu landoj ĝuis tre altkvalitan programon kaj varman etoson.

En la festivalo prezentis originalan Esperanto-kulturon profesiuloj kaj amatoroj. Kelkaj programoj estas jam tradiciaj, kiel la koncertoj de la rok-ensembloj Amplifiki (el Svedio kaj Francio) kaj Persone (el Stokholmo). Ankaŭ la teatron Krizalido el suda Francio ni revidis kun plezuro. Tiun ĉi fojon ĝi premiere prezentis fabelon pri "Meluzina", en tre sukcesa surscenigo. Kaj kompreneble Jarlo Martelmonto, konkretisma poeto Esperanta kaj sveda, pensigis kaj mirigis nin per sia prezentado.

Novaj steloj sur la festivala scenejo alvenis interalie el Sovetunio. Plej fortan impreson faris la kanzonistoj Ĵomart kaj Nataŝa el fora Kazahio. Kun aspektoj de elfino el norda arbaro kaj neatendite milda batalanto de Ĝingis-Hano, ili kantis originalajn verkojn de Ĵomart – dolĉamarajn, internacistilajn kantojn, kiuj, por citi unu el ili, "agordas animon minore". Tuŝis kaj amuzis nin ankaŭ Teatro Interateliero el Leningrado, kaj kantigis kaj entuziasmigis nin Oksana kaj Vladimir, ukraina paro el Moskvo. La riĉan teatran programon kompletigis Jerzy Fornal el Pollando per tri spektakloj.

Eĉ konsiderante kromajn erojn kiel prelegojn, urban promenon, talentovesperon, tamen oni konstatas, ke la esenco de la festivalo estas muziko kaj teatro. Literaturo ludas duarangan rolon, ĉi-foje eĉ ne troviĝis deca librostando.

Kompare kun la dua festivalo en 1988, mi trovas la ĉi-jaran programon same aŭ pli altnivela, la etoson pli intima, ĉu pro pli taŭga ejo, ĉu pro pli malmultaj partoprenantoj. Estas nedubeble, ke la aranĝo meritas multe pli grandan publikon.

Sten Johansson (Svedio)

Instruado:

Helpkrio el Hungario

Instruisto Ernő Csiszár argumentis en februaro, ke estas senutile instrui Esperanton kiel la kutimajn lerneajn fremdajn lingvojn. Anstataŭe, gravan rolon havas la organizita movado – kaj unuopaj esperantistoj.

Nenie kaj neniam estis pli favora la enlerneja situacio de Esperanto ol nun en Hungario. Pasintjare la rusa lingvo perdis siajn privilegiojn, senprestiĝe ĝi subgradiĝis ĝis la nivelo de libere elektelebla fremda lingvo. Samtempe Esperanto fariĝis jure egalrajta, kompare al iu ajn lingvo. Amasegoj da gelernantoj – same la gepatroj – eĉ aŭdi ne volas plu pri la rusa lingvo.

La lingvo-instruado restas tamen plu deviga, en gimnazioj ekzemple (mezgrada lernejo por 14-18-jaruloj) oni estas devigata elekti du fremdajn lingvojn. Problemon kaŭzas la manko de lingvo-instruistoj – eĉ pri la angla. La lerneaj direktoroj – por ne riski la postenon – volonte rezignas pri la instruado de la rusa lingvo kaj anstataŭ ĝi – por plaĉi al la publiko – rapidas enkonduki laŭeble plurajn lingvojn, ankaŭ Esperanton. Multe gravas, ke la elekteleco ampleksiĝu.

Pasintjare jam en plurajn elementajn kaj mezgradajn lernejojn oni enkondukis Esperanton. Kie ne mankis diplomita pedagogo, tiel ekestis la ebleco, kaj la gelernantoj elektis ĝin amase. En gimnazioj fariĝis populara la lingvo-paro angla-Esperanto.

Laŭ la ĝisnunaj spertoj oni povas konkludi: Esperanto havas bonan ŝancon je longdaŭra radikiĝo en la hungara lerneja sistemo. Tamen: nenie kaj neniam estis pli urĝa la elformiĝo de internacia solidareco kaj efektiva helpo, ol nun por la hungaraj pedagogoj kaj por la lerneaj klasoj, kiuj lernas ankaŭ Esperanton. Fari el Espe-

ranto ordinaran studobjekton, tio havas nenian sencon. Ankaŭ por tiuj gelernantoj, kiuj libervole elektis ĝin por plurjara deviga lernado, ĝi nepre fariĝu aplikebla, efektive parolata lingvo sur internacia nivelo. Ne nur la organizita movado, eble eĉ pli grave unuopuloj povus helpi. Al kleraj esperantistoj estas superflue klarigi la helpmanierojn; kiuj volas, certe trovas kelkajn. Tamen mi menciuj almenaŭ unu: eksterlandanoj – studentoj, pedagogoj, interesitoj – venu kaj vizitu Esperanto-studhorojn. Nekredeble valora helpo estas eĉ kelkminuta ĉesto, nur kelkfraza interparolado kun

Kiel diferencigi Esperanton disde aliaj studobjektoj, tedemaj, nepraktikaj kaj facile forgesiĝblaj?



Carson subtenas Afrikon kaj Azion

En aprilo la Eduka Fondaĵo Carson disdonis CDN \$3 500 por financi novajn projektojn, kiuj celas instrui Esperanton aŭ kreskigi la Esperantan movadon. Ĉi-jare la kuratoroj decidis subteni la jenajn petojn:

- Belgio – finpresi franclingvan kurson por afrikanoj.
- Nederlando – konverti vidbendan serion de Cseh-metoda instruado en sistemon NTSC por uzo en Japanio, Kanado, Koreio, Venezuelo kaj Usono.
- Hungario – sendi senpage du jarokolektojn de *Juna amiko* al adresoj en Afriko kaj eventuale al aliaj kontinentoj kun kreskantaj subtenindaj movadoj.

- Pollando – vojaĝi tra Azio por instrui Esperanton kaj fondi E-asociojn en Mongolio, Honkongo, Filipinoj, Vjetnamio kaj Tajlando.
- Irlando – eldoni kaj disdoni Esperantan tradukon de la libreto “Unueco en diverseco: malpli uzataj lingvoj en la Eŭropa Komunumo”.

Eduka Fondaĵo Carson bonvenigas novajn petojn por finance subteni projektojn edukajn. Por petformularo, bv. skribi al: Allan Simon, sekretario de E.F.C., 1339 Hamilton ST. N.W., Calgary, Alta. T2N 3W8 Kanado. Limdatoj por ricevi petformularon estas 1 septembro kaj 1 aprilo.


Anne Neave (Kanado)

la gelernantoj; la okaza sperto, ke per Esperanto eblas interkompreniĝi kun homoj el la plej malsamaj partoj de la mondo.

Estas interese mencii, ke en nia gimnazio (Thuri György Gimnázium, Vörös Október u.9., H-8100 Várpalota) dum la nuna studo-jaro okazis dufoje vizito de eksterlandanoj. Unue venis japanaj pedagogoj – ne esperantistoj, bedaŭrinde, sed ankaŭ ili vizitis Esperanto-studhoron –, poste samideano el Suda Koreio. La japanoj eĉ ne provis interparoli – angle – kun la gelernantoj, s-ro Puramo Chong el Seulo ĝue paroladis kun ili – en Esperanto.

Do, ekestis la demando: ĉu Azio estas pli proksime al Hungario ol Eŭropo?

Ernő Csiszár (Hungario)



Melankolio, majstre kaj modeste

Stultaj infanoj, La. Ana María Matute (1926-). El la hispana trad. Liven Dek. Santander: Miguel Gutiérrez Adúriz, 1988 (sen indikoj). 100p. 18cm. Hispana literaturo n-ro 5. 15,00 gld.

Infano el la alta maro kaj aliaj rakontoj, La. Jules Supervielle (1884-1960). El la franca trad. Hervé Gonin k.a. Parizo: UFE, 1988. 64p. 21cm. "Franca esperantisto", n-ro 394 (Antologieto de la franca literaturo). 8,10 gld.

Ŝtono de helpo. Hans Warren (ps., 1921-). El la nederlanda trad. Gerrit Berveling. Den Haag: Esperanto Kultura Servo, 1989. 72p. 21cm. 19,50 gld.

Recenzojn, kiuj klopodas trafi plurajn celojn per unu ŝtono, mi ĉiam malŝatis. Jen tamen tri libretoj, kiujn apudigas – krom tempa hazardo – pluraj similaj ecoj: temas pri (pli-mapli) unua prezento en Esperanto de tri aŭtoroj (hispana, franca, nederlanda) almenaŭ meze gravaj en sia kulturo, per modesta amplekso. Ĉiujn tri tradukis kleruloj delonge dediĉitaj al la diskonigo de siaj kulturoj en la verda medio. Fine, ĉiu verkinto kreas, propramane, ian maltrankvilige melankolian etoson.

La ofte angoraj apenaŭ-historioj de **Matute** pentras malidilian infanmondon, kiu rekonsciigas en ni la verajn dimensiojn de niaj etulaj timoj. Tamen, tiu mondo ne tute malamikas: en la infana percepto svarmas objektoj *vivaj* ("krano rigardis lin per sia sola okulo blinda", p. 81), ofte konsolas per sia kompanio. Naturo kaj infano ankoraŭ estas unu, ĝis la grado, ke li/ŝi, veninta el la naturo, remortas en ĝin: en "La turpa infanino" la protagoniston reakceptas tero, en "Karbo-polvero" kaj "La maro" puta kaj mara akvo, en "La incendio" kaj "La infano de la fornoj" fajro: praelementoj. Aŭ eĉ la infano preferas ne enmondiĝi ("La infano nenie troviĝanta"). La motivo de morto traplekta ĉi tiun *angore dolĉan* universon, kaj ĝuste la sperto pri vivofino difinas la limon inter infanaĝo kaj plenkreskeco ("La infano, kies amiko mortis"; "La paska ŝafideto").

La verko havas (ĉu hazardan?) eĥon en nia originala literaturo: la formehave similan cikleton de Giorgio Silfer "La stultaj paroj".

La lingvaĵo de Liven Dek alojas harmonie neologismojn PIVajn kaj nePIVajn (*tarda, anksia, hida; aperti, ĉendi*) kun solvoj "elinternaj" kaj koncize frapaj ("Nokton, naskiĝis infano . . ."; *ĝiakole*). Same li laŭdendas pro la iniciato, kiu fruktis la serion miascie unikan de "Hispana literaturo", jene atingintan sian kvinan volumon. La mankaresa formato lerte paŭzas bone konatan hispanan serion,



Kvina ero en unika serio . . .

sed mi kredas, ke tiu malhavas tiel stilotrafajn ilustraĵojn kiel la desegnoj de Pedro Ullate.

La infano el la alta maro kaj aliaj rakontoj aperis kiel unu el tiuj specialaj literaturaj numeroj de "Franca esperantisto", kiuj – dank' al ĉefredaktoro kaj plej ofta tradukanto Hervé Gonin – "celas al iom-post-ioma eldonado de antologieto de la franca literaturo en Esperanto". Jules Supervielle apartenas al la gravaj poetoj de la literatur-historia ĵuso: oni reprimantas tiun ĉi malskolan solulon, kies plena verkaro estas aperonta en la prestiĝa eldono de Pléiade. Naskita en Urugvajo, li inspiriĝas de la pampo kaj oceano ĝis panteismeca kosmo-sento.

Liaj ĉi-volumaj 11 noveloj poezie rerakontas antikvajn mitojn per la emo kaj vervo de Ovido, aŭ kreas novajn: la subakvan mondon de dronintoj ("La nekonatino de Sejno"), la orfeecan historion de "Junulino kun violona voĉo". Morto hantas ankaŭ la paĝojn de Supervielle (la titola rakonto preskaŭ enirus la Matute-volumon), sed prefere kiel milda, mita metamorfozo. Por mia gusto lia stilo estas iom sukera, sed pli ol tio min ĝenis tro ofte sklava fraz-modlado de la traduko (la supla adaptiĝemo de nia lingvo estas kaj avantaĝo kaj kaptilo!), sengustaj vortelektaj ("la internaĵo de la tero", p. 43), francecaj vortuzoj ("sendube" por "verŝajne") kaj temp-akordigo ("La urso sin demandis ĉu ĝi estis vere finkreita", p. 56); simplaj eraroj ("leono sin kuŝis", p. 41; "ĝena estis, ke . . .", p. 42). La tekstojn tre bone akompanas abunda prezento de la verkinto: komplezo al la leganto, kiun la aliaj du volumetoj orientas per tro modesta prinoto.

Per la romaneto *Ŝtono de helpo* la fervore fekunda Gerrit Berveling donacas al ni juvelŝtonon el la verkaro de unu el la plej elstaraj nomoj en la nederlanda literaturo; aŭtoro tiom nuntempa, ke "Nederlandan antologion" fermas ĝuste li. Decida sperto de Warren estas geĵeco: destino, fatalo, kiu pelas al tragedio du rolantojn; tragedio individua, kiun fonas la homara koŝmaro de la mondmilito. La mornan izolejon, kiun – laŭ klasika recepto – penetras fremdulo por provizi deeksteran vidpunkton, fine atingas falĉile la milito. Post du jaroj, la revenanta fremdulo – mem kaŭzo kaj atestinto de la eventoj – retrovas nur nehelpeblan ruinon de la bien-domo kun biblia nomo "Ŝtono de helpo" kaj deŝiritan korŝiran poemfragmenton. Samkiel ĉe Liven Dek, ĉe Berveling sentiĝas propra verkista sperto en la senĝena stilo, kiu scias distingi bonvenajn ĝermanaĵojn ("vi devos al la urbestro") aŭ necesecon de kunmetita tempo ("Unu lia letero senresponde estis returniĝinta", p. 60). Oni eble diskutus la sensubjektan pasivon kiel "se estos serĉate" (p. 17).

Malgraŭ persona ŝato de ĉiuj tri libroj, mi finu per dubemaj demandoj: ĉu ne tro ofte influas la elekton de tradukotaĵo subjektivaj preferoj? Ĉu, antaŭsciente la publicajn eblojn, ni ne limigas nin al kvante – kaj ofte kvalite – modestaj verkoj? Kaj: ĉu ili respondas al efektiva bezono de nia legantaro?

István Ertl (Hungario)

Gutoj de frivolo kaj morno

Sinjoro Jokasto kaj aliaj noveloj. Guy de Maupassant (1850-1893). El la franca trad. Daniel Luez. Chapecó: Fonto, 1987. 110p. 21cm. Fonto-serio n-ro 17. 14,40 gld.

Norda odiseado kaj aliaj rakontoj. Jack London (1876-1916). El la angla trad. Fernando de Diego. Chapecó: Fonto, 1988. 111p. 21cm. 14,40 gld.

Jen du novelaroj sen ajna evidenta similo, sed kun samaj intereso kaj vervo. Unuafoje en 1898 eldoniĝis novelo de London (1876-1916), kvin jarojn post la morto de Maupassant (1850-1893). Tiu, usona aventuristo kaj aventurulo, verkis novelojn pri vivo en Alasko, en kruda kaj frida naturo, dum ĉi lasta prezentas al ni scenojn el Francio, el kiuj emanis aromo de verbeno kaj lavendo, kaj kiujn spicas diverstona erotiko.

En la noveloj de Guy (mortinta en frenezulejo) troveblas voluptamo kaj amoremo kiel motivoj de (preskaŭ) ĉies

agoj, sed la fina elnodiĝo de la intrigoj montriĝas jen komika kaj eĉ burleska, jen skue tragedia.

Kiel klarigas koncize la prezento al *Norda odiseado*, la rakontoj de Jack (mortinta pro alkoholo kaj morfino) "priskribas la violentan vivon de homoj en konstanta lukto kontraŭ la naturaj elementoj kaj kontraŭ la agresaj instinktoj de aliaj homoj (. . .) inter la limoj de primitiva honorkodo kaj de rekta, vizaĝ-al-vizaĝa defio".

Ambaŭ verkoj samtempe distras bonan leganton kaj instigas lin pensi pri tiu bizara besto nomanta sin homo. Ne pro nenio la aŭtoroj miksturis en ilin same gutojn da frivolo kaj humuro, kiel erojn da morna pesimismo.

La traduko de Daniel Luez bonas, kvankam daŭre mi sentis ĝin traduko. Iom agacas abundeto da adjektivaj "iu" kaj da postpasivaj "per". Eĉ la ŝiboletan "konatulo" anstataŭ "konato" mi renkontis dufoje. Aldone, ŝajnas preferinde ordigi novelkolekton kronologie.

La redono de Fernando de Diego impresas kiel originalo; lia senbalasta, esprimiva prozo elvokas en mi la riĉan kaj fluan stilon de, ekzemple, Ludoviko kaj Kolomano.

Fine, decas gratuli la entrepreneman Gersi Alfredo Bays, kiu, sub la eku-mena marko Fonto, regalis nin per ĉi tiu leginda duopo.

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Konsoloj de la eturbanoj

Simha. Rakonto pri ĝojoj. Isak Samokovlija. El la serbokroata trad. Jovan Zarković. Sarajevo: ELBiH, 1988. 110p. 20cm. Antaŭparolo de Ivo Andrić; postparolo de Staniša Tutnjević. 21,00 gld.

Ĉi tiu novelaro de jugoslavia verkisto (hebredevena) Isak Samokovlija estas inda ekzemplo de verkista talento kaj ista rakontmetodo. La mondo, kiun priskribas Isak Samokovlija, malgraŭ sia naciistoria deko kaj specifaĵo, estas tamen universala kaj egale komprenebla por ĉiuj: la eturba mondo vivanta propran rutinan vivon, kun siaj etaj signifoj kaj egaj problemoj; batalo por pluvivo, batalo por nemorto. Temas pri homoj sen espero pri io ajn granda en la vivo, pri homoj kondamnitaj al eterna vivetado. Tial *Simha* estas universala, ĉar la eturbanoj estas ni ĉiuj, "la ordinara mortuloj", kiuj ne sidas sur etstrataj benkoj flikante ŝuojn kiel niaj prauloj, sed kiuj same laboracas de la naŭa ĝis la kvina,



En la rakontoj de Jack London ĉefrolas la naturo, sovaĝa kaj ŝajne senlima, defianta la kapablojn kaj memkomprenon de la homo.

revante pri vespera enlitiĝo. Por la prauloj la ĝojon konsistigis konversacio kaj vespera fumado, por ni televidado kaj narkotaĵoj. Kie do estas la triumfo de la animo? Nenio, tutnenio ŝanĝiĝis krom la teknologio de amuzo. Tamen, Samokovlija estas verkisto pri optimismo: li kredas, ke la homo povas en sia mizera sorto trovi sin mem, triumfante per propra spirito.

La traduko de J. Zarković estas aparte menciinda. Ĝi sendube iĝos parto de la Esperanta tradukologio. Delonge mi ne traegis ĉi tiel Esperantan Esperanton, kiu per sia sen-naciismo estas destinita al la univer-

sala leganto. Multaj novismoj estas sukcese uzitaj por respeguli la stilon de Samokovlija (ekzemple: *jesviro, neviro, umdek, jesmajstre, egboato, oj, musnesto, rigardegi* . . .) samkiel ofta uzo de la aktiva kaj pasiva participo futura (*enpaŝonte vendejon, la paŝonto*), aŭdacaj stilaj distingo (kiujn la Esperantaj tradukistoj malofte respektas). Tiu erudicia kono de la universala esenco kaj spirito de Esperanto ebligis al ĉi tiu traduko, kiun konservativuloj sendube atakos, rotkviĉecan malefemeron kaj longedaŭran beletre-poetikan valoron.

Zlatoje Martinov (Jugoslavio)

Plej trafas originalaĵoj

Sferoj 4. Komp. Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: la kompilinto/ Grupo Nifo, 1986 (neindikita). 128p. ISBN 84 3985 753 5. 19cm. Ilus. 18,00 gld.

Sferoj 5. Komp. Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: la kompilinto, 1987. 140p. ISBN 84 3988 777 9. 18cm. Ilus. 18,90 gld.

Sferoj 6. Komp. Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: la kompilinto, 1988. 138p. ISBN 84 4042 065 X. 19cm. Ilus. 18,00 gld.

Por vera ŝatanto de sciencfikcio (SF) la volumoj de la serio *Sferoj* estas juveloj. Estas agrable montri ilin al amikoj-neesperantistoj, argumentante por Esperanto. Oni karesas respektive la glaciajn kovrilojn, foliumas, atentante desegnaĵojn kaj nomojn de aŭtoroj, kaj lamentas pri sia nescio de Esperanto.

Sferoj 4 komenciĝas per metaforeca rakonto de Jorge Luis Borges, "La libro el sablo". La libro, kies paĝoj neniam ripetiĝas – ĉu tio estas la vivo, ĉu la literaturo, pri tio pensu la legantoj. La aŭtoro donis al ilia fantazio impresan puŝon. Antiutopiaj "Centmilaj jaroj" de Pekka Virtanen kaj la "Fina kanto" de Zbigniew Prostak apud tre malnova kaj tial simpla kaj optimisma rakonto de la fratoj Strugackij, moral-instrua rakonto de Pär Lagerkvist, scienc-psikologia rakonto de McKenna prezentas varian kolekton por pluraj gustoj. Sed, ĉar ne eblas kontentigi ĉiujn, apenaŭ iu kontentos plene.

Pli interesa en tiu senco aspektas la 5-a volumo de *Sferoj*. Ĝi havas la unuigan bazon, ne gravas, kiom diskutinda ĝi estas. La numero estas speciala kaj konsistas nur el verkoj de virinoj. Pri preskaŭ ĉiuj rakontoj, eĉ in-temaj, eblas diri, ke ankaŭ viroj verkas tiajn, sed ia komuna spirito animas la tuton. Ornamaĵo de la volumo estas la sprita rakonto de Joanna Sinisalo, "Bezonata sperta virgino". Ve, la longeta "Drakodamo" ne atingas la nivelon eĉ duone. Ĉi tie miksiĝas elementoj de mezepoka kavallira romano, garnitaj per hiperseksa kulto de kosma diino, kun nedetrubla amo de disigitaj futuraninoj . . . Oni bonorde atingas la finon de tiu fluo nur dank' al ĝenerala pozitiva impresado de la libro.

La 6-a *Sferoj* elstaras disde la antaŭaj kolektoj. Eble pro tio, ke ĉiuj ties

rakontoj estis verkitaj en Esperanto, kaj, do, la samideanaj aŭtoroj pli facile atingas la imagon de la legantoj? Ĉu tiel, ĉu ne, sed "Tradicio" de Pekka Virtanen, "La neforlaseblaj" de Arnoldo Águila, "Kasteloj sur glacio" de Georgo Kamaĉo estas ege bonaj. Tute kredeble, ili ne perdiĝus surpaĝe de ajna nacilingva SF-magazino. La rakontoj de István Nemere, kiel ofte okazas, lasas ambiguan impreson pri la alta profesieco de la aŭtoro kaj banaleco de la situacioj. Ŝajne ion tian, ne menciante la robotojn de la Galaksia Polico, skribis ankoraŭ

sumeroj sur siaj argilaj tabuletoj. La rakontoj facile englutigas, ne lasante al la cerbo ion por digesti. "Or" kaj "Laŭra" de Liven Dek estas senriproĉe aventuraj, sed samtempe imagokaptaj. Kun intereso oni legas la rakonton de fama akademiano Bernard Golden, kvankam la ideo ne estas nova. Ĝenerale, la kolekto estas brila kaj, eĉ se iuj verkoj estas ne sufiĉe sukcesaj, ili akiras plifortigan energion de la najbaraj rakontoj.

Fine ni esprimu la deziron de simpla SF-ŝatanto: "Pli da *Sferoj*!"

A. Ananjin (Sovetunio)



Litero aŭ cifero?

"O" kaj aliaj rakontoj. D. Mikuličić. El la serbokroata trad. J. Zarković. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1988. 216p. 20cm. 13,20 gld.

Tiun ĉi libron, evidente, ne legu tiuj, kiuj (pro enigmaj kriterioj, principoj aŭ dogmoj) neniam legas sciencfikciaĵojn. Prefere ili plu legu sian plenan vortareton, laŭkutime.

Tiun ĉi libron ne legu ankaŭ tiuj, kiuj legadas ajnajn verkojn, jen sciencfikciajn aŭ detektivajn, jen biografiajn aŭ aventurajn, ignorante ĝenrajn etikadojn kaj antaŭjuĝojn. Ili ne trovos en ĉi tiu novelaro legindan sciencfikcian beletraĵon. Mankas personoj, herooj, roluloj (teraj, eksteraj aŭ eks-teraj), kiuj hantu nian menson postlege (kiel la jam kara *Ijon Tichy* de Lem); mankas lokoj, spacoj, mondoj, atmosferoj, kiujn ni vizitu sonĝe aŭ reve (kiel la *Rivermondo* de Farmer aŭ la marsaj svagaj pejzaĝoj el la *Kro-*

nikoj de Bradbury); mankas viviga priskribo de socio (kiel *Kazohinio*, aŭ la *Brava nova mondo* de Huxley); mankas timiga, defia, pensinstiga novaĵo (kiel la *Marsanoj* de Wells aŭ la *Rendevuo kun Ramo* de Clarke); mankas preskaŭ ĉio.

Ankaŭ ne tiuj, kiuj ofte, amatore, legas sciencfikciaĵojn. Ili esperas, ke, se aŭtoro traktas konatan temon, li almenaŭ faras tion originale. Tial ili trovos ĉi tiujn novelojn banalaj, ties ideojn nesufiĉe disvolvigitaj aŭ prilaboritaj, foje ankaŭ stultaj kaj naivaj, ties filozofumadon pretenda kaj supraĵa, kaj do ne emos digesti pluajn gurmaĵojn pri tempomaŝinoj, relativaj dioj, atlantido, nifoj, robotoj kaj ciborgoj, galaksiaj konfederacioj kaj similaj ĉiamaĵoj.

Fine, ne legu ĝin ankaŭ tiuj, kiuj legas nur sciencfikciaĵojn. Neflua traduko plus neglekta lingva revizio aldonas al kelkaj sintaksaj ekstravagancoj (senfinaĵa prepoziciigo de unukaj plursilabaj radikoj) ankaŭ grumele kriplitajn vortformojn kaj nomtransskribojn: (el inter multaj aliaj) *atlantiso*, *meteorito*, *homunkuluso*, *perpendikla*, *brutuso*, *palpiti*, *koordini*, *tarantolo*, *amplifiki*, *cinismo*, *dirigi*, *identifiki* anstataŭ la kutimaj atlantido, meteoro, homunkulo, perpendikulara/orta, bruto, pulsi, kunordigi, tarantulo, amplifi, ciniko, direkti, identigi. Nekredeblas, ke, fine de la dudeka jarcento, ankoraŭ necesas insisti pri lingvaĵoj . . .

Resume, mi emas konsideri la titolon de ĉi tiu novelaro ne kiel literon, sed kiel ciferon, kiu montras ĝian valoron. Interesiĝuntoj pri sciencfikcio prefere turnu sin al ajna volumo el la serio *Sferoj*.

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Malbone kanalizita libido


Abismo/Abyssos. Ĵano Lajpo, Rikardo Ŝulco (Hans Leip, Richard Schulz). Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1988. 78p. ISBN 39 2257 051 8. 20x20cm. Ilus. 18,30 gld.

Temas pri kvarera verko: reproduktio de 24 litografoj de germana artisto Hans Leip, akompanataj de po du sonetoj, unu germanlingva, alia Esperanta, ambaŭ de Rikardo Ŝulco, kaj fine klarigaj notoj kun biografioj kaj portretoj de ambaŭ aŭtoroj.

La desegnoj fontis el abismecaj vizioj, sojle de intermitaj senkonsciigoj, supozeble pro veneniĝo per insekticido. Tiujn viziojn – Leip aŭtobiografias – li forigis el la animo per la abismaj kartonoj. Ties hororaj kaj groteskaj homaj, bestaj kaj mitaj figuroj originis el prihadesaj imagoj dum lia tenaca sinkroĉo al la vivo, per kiu li sin perforte suprensvingis por ne definitive fali en la submondon. Li konfesas, ke la perdo de konscio permesis al li enrigardon en animaj kaj mitaj abis-

moj de la subkonscio. Por la serioj li elektis titolojn, poste fariĝintajn temoj por la sonetoj. Psikologo eble tute alie interpretus la plej multajn pro ilia enhavo de malbone kanalizita libido.

Pri la germanlingvaj sonetoj Leip skribas al R.S. (en ties traduko): “Viaj



sonetoj ja forte emocias min, kaj tiom, kiom mi tion sentas, ili ankaŭ profunde tuŝas miajn antaŭajn respektive postajn ideojn”. Ĉar Leip ankaŭ mem verkis poemojn, ni akceptu, ke lia laŭdo ne naskiĝis el nura ĝentileco.

La klasika soneto postulas du kvaropajn kaj du triopajn rimojn. Kiam nepras rigore disvolvi unu pensfadenon, tio sufiĉe malfacilas. Ne tiom tamen ĉe la germanlingvaj sonetoj, ĉar temis pri libera interpretado de desegnoj. Sed tutcerte ilin la aŭtoro poste provis traduki, foje pli-malpli sukcese, ekzemple ĉe la unua soneto “Naskiĝo de Deino”, plejofte ne tiom, ĉar tiucele necesus fideli ne nur al la titola temo sed ankaŭ al la originala enhavo. Li do ofte diverĝas pro netrovo de rimo, malgraŭ la senĝena uzo de adasismoj. Tiun diverĝon li ruze pravigas, asertante ke “la Esperantaj versioj tute ne estas tradukoj”.

Ne gravas tamen, ĉar ĉiuokaze temas pri subjektivaj impresoj. Kio plej gravas, estas la bona prezentado de plastika artaĵo kun egalrajta Esperanta prezento.

L. H. Knoedt (Brazilo)

Alispeca kristanismo

Serio “Voĉoj Kristanaj”: 1) *Evangelio laŭ Petro & La Morto de Jesuo kaj kio poste?*; 2) *Apologio de Tertuliano*; 3) *Sinkonservo; pri kristanismo kaj nukleaj armiloj*; 4) *Al Diogneto*; 5) *Unitariismo* de Kenneth Twinn; 6) *Ekzegeza komentario pri Jona* (en preparo); 7) *Dio, kristanismo, aliaj religioj* de Gerrit Berveling; 8) *La Evangelio laŭ Maria Magdalena*; 9) *Jam temp' está!*; la “Kairos-dokumentoj” de sud-afrikaj kristanoj; 10) *Beatrijs; mezepoka Maria-legendo*; 11) *Kie oni trovas tion en la Korano?* de Isai Sumer; 12) *Kuraĝigo por la martiroj* de Tertuliano; 13) *Kantu al la Eternulo*; kantoj ĉefe el la ĉeĥa; 14) *La virino en la judismo* de M. de Goeij; 15) *Se KELI poetas*; originalaj poemoj el la rondo de KELI; 16) *Kantiko de l' kreitaĵoj* de Francisko de Asizo; 17) *Ekumena Jardeko de Eklezioj en solidareco kun virinoj*; 18) *Defendo de la libro pri la Triunuo* de Johano Hus. Vlaardingen-Breda: VoKo, 1980-1989. Diversaj prezoj.

Recenzi tutan serion da libroj ne estas facila tasko. La originon de la serio la eldonisto, Gerrit Berveling, malkaŝis en la 16a produktaĵo. En 1980, li serĉis eldoniston por sia traduko de la *Apologio* de Tertuliano. Ĉar li trovis neniun, li decidis mem eldoni ĝin. Fakte tiu ĉi estas la nura vera “libro”, la ceteraj el la serio estas broŝuroj.

Oni povis konstati antaŭ la ekzisto de ĉi tiu serio, ke sur la tabloj de niaj libro-servoj preskaŭ tute mankas kristanaj libroj, escepte kompreneble de la Biblio mem, kiam oni facile trovis ekzemple broŝurojn ateistajn (estis tamen kelkaj verkoj el Esperanto-Misio). Dek jarojn poste, la kolekton oni povas klasifiki jene:

- la prakristanaj tekstoj: Tertuliano, do (*Apologio* kaj *Kuraĝigo por la martiroj*), alia teksto *Al Diogneto*, kaj apokrifaj tekstoj komentariitaj;

- mezepokaj tekstoj: *Beatrijs*, *Kantiko de l' kreitaĵoj*, *Defendo pri la Triunuo* de Hus;

- kaj malfermo al la nuna mondo: pri la virinoj en la Eklezioj, pri nukleaj armiloj, pri apartismo kaj pri unitariismo. Berveling ankaŭ malfermas pordojn al Islamo, *Kie oni trovas tion en la Korano?*, kaj al judismo, *La virino en la judismo*. Li krome aldonis *Dio, kristanismo, aliaj religioj*, verkon, kiun li preparis por fariĝi pastoro. Eble ne precize el ĉi tiu vidpunkto laboris Mircea Eliade, sed mi tamen trovas


domaĝa, ke li ne estas ie referencita en ĉi tiu teksto.

Du libroj estas apartaj en la serio. Temas pri poem-kolekto el la verkoj de KELI-anoj, *Se KELI poetas*, kaj kolekto de himnoj, tradukitaj precipe de la karmemora Jiří Kořínek.

Multaj el la tekstoj, tradukitaj el la latina aŭ el la greka, devenas certe el la studoj de G.B., klasika filologo. Notu ankaŭ, ke la remonstranta pastoro (tio li estas) ŝajne ŝatas eldoni tekstojn iel eksternormajn: Tertuliano mortis herezulo; aperis la apokrifaj libroj kaj prezento de unitariismo.

Per artikolo tiel (mal)longa, mi ne povas analizi la tuton, vortare, gramatike, preserare, ktp., kaj mi ne tion aŭdacus. Kia mi estas por kritiki akademianon? Mi nur notas kelkajn “maniojn”: li ŝatas uzi ĉi sen tiu, kaj regule uzas kelkajn t.n. neologismojn. El ili mi retenas la laŭ mi tre bonan trovon “versiklo” anstataŭ “verso”, “verseto” aŭ “alineo”, por la Biblio same kiel por la Korano. Teknike, la paĝoj estas tajpitaj, foje poste reduktitaj, kaj presitaj (fotokopie?). La rezulto estas sufiĉe bone legebla. Se vi deziras havi alian bildon pri la kristanismo, kondiĉe ke vi jam havas opinion alian ol nur antaŭjuĝo, legu ĉi tiujn librojn.

Philippe Cousson (Francio)



Dankon, amiko! Claude Piron. Vieno-Budapeŝto: Pro Esperanto/HEA, 1990. 36p. ISBN 96 3571 110 7. 20cm. Facilflua kaj streĉa rakonto pri naiva junulo, lasita senmona en fremda urbo kaj frontanta teroristojn. 9,60 gld.

El zagreba koro. Kantotekstoj. Komp. Radenko Milošević. Zagreb: Zagreba Esperanto-Ligo, 1989. 32p. 14cm. Popularaj kantoj, parte tradukitaj el la kroata, parte Esperantaj aŭ internaciaj. 2,40 gld.

Esperantalo detruendas. Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1990. 72p. 17cm. Idiosinkraziaj komentoj pri Esperantujo. 4,50 gld.

Etimologia vortaro de Esperanto. Volumo 1: A-D. Ebbe Vilborg. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1989. 104p. ISBN 91 8528 817 9. 24cm. La oficiala radikaro de la lingvo, kun indikoj pri la unua apero de ĉiu radiko, parencaj vortoj en la angla, franca, germana, itala, pola, rusa kaj latina, komentoj pri la Esperanta formo, ekvivalentoj en pra-Esperanto, Ido, Interlingue kaj Interlingua, kaj skizo de la praorigino kaj postaj semantikaj ŝanĝoj. 26,40 gld.

Fervojista Esperanto-Societo Zagreb. 35-jariĝo 1954-1989. Zagreb: Zagreba Esperanto-Ligo, 1989. 32p. 14cm. Historieto. 2,40 gld.

Freneza tago, La, aŭ La edziĝo de Figaro, parto 2 (1784). P.-A. Caron de Beaumarchais (1732-1799). El la franca trad. Hervé Gonin. Paris: UFE, 1990. 70p. ISSN 0775-7698. 20cm. Antologieto de la franca literaturo. La lastaj tri aktoj de fama franca komedio, kiu miksas am-intrigon kun revolucia pledo por libero. 10,20 gld.

Frequenzwörterbuch Esperanto-Deutsch. Die meistgebrauchten Wurzeln der Esperanto-Literatursprache. Joachim Dietze. Halle: Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg, 1989. 68p. 20cm. Studo pri la leksiko uzita en politikaj, kulturpolitikaj kaj popularsciencaj tekstoj el diversaj E-revuoj en 1969-1987. 7,50 gld.

Kvazaŭ l' arkeo de Noaĥo. Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1990. 72p. 17cm. Disfrita pensaro diverstema. 4,50 gld.

Mi vizitis grandan urbon. Gbeglo Koffi. Goiânia-Go: Zamenhof Editores, 1989. 43p. 20cm. Originala rakonto pri la togolanda vivo, precipe la kontrasto inter urbo kaj kamparo: interesa, humura kaj kortuŝa. 10,50 gld.

Mikrokomputila kaj mikroelektronika fakvortaro angla-germana-hispana-Esperanta-hungara. Magda Kovács. La Esperantan parton trad. Iván Bujdosó. Budapeŝto: LSI, 1989. 294+258+288p. ISBN 96 3593 028 3. 23cm. Tri-voluma. Alfabeto listo de unuopaj vortoj aŭ esprimoj, kun ekvivalentoj en la aliaj kvar lingvoj. 79,50 gld. por la tri volumoj.

Milionoj de s-ro Fereno, La. Anastasio Lopez Luna. El la hispana trad. Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1990. 94p. ISBN 95 0432 707 9. 17cm. Melodramo: malriĉa pentristo amas la filinon de avara kaj riĉa komercisto. 9,00 gld.

Nesenditaj leteroj el Japanio. Spomenka Štimec. Zagreb-Hukuoka: Hukuoka Esperanto-Societo, 1990. 66p. 18cm. Facetoj de la japana socio, viditaj tra la okuloj de perceptema vizitantino. 12,00 gld.

Orm la ruĝa. Frans G. Bengtsson. El la sveda trad. Bertil Nilsson, kunlaboris W. Auld kaj W. Pilger. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1989. 216p. ISBN 91 8528 816 0. 22cm. Aventura kaj humurplena proza eposo pri la vikinga socio kaj la alveno de kristanismo, tre flue kaj belstile verkita. 43,80 gld.

Pensu alimaniere. Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1990. 72p. 17cm. Sepa kolekto de "Ergotaĵoj". 4,50 gld.

Spertoj kaj avertoj de la 45-a Internacia Junulara Kongreso 1989. Red. Gaco Nauta. Nederlanda Esperanta Junularo, 1990. 22p. 21cm. Utila konsilareto pri la organizo de granda (500-homa) internacia renkontiĝo. 4,50 gld.

Ŝtona dormanto. Mak Dizdar (1917-1971), komp. Razija Lagumdžija. El la serbokroata trad. Jovan Zarković. Sarajevo: ELBIH, 1989. 94p. 23cm. Kompilika, densa poemaro inspirita de la tomboŝtonoj kaj aliaj postsignoj de la antikvaj bosnianoj; meditado pri la celoj de la vivo kaj la morto. 14,70 gld.

Tambur-eĥo. Ergoto de Bonaero (ps.). Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1989 (neindikita). 72p. 17cm. Kvara kolekto de versaretoj k.a., plejparte pri Esperantio. 4,50 gld.

Tute eta nekompleta antologio el la nuntempa ĉeĥa poezio. Div. aŭtoroj, el la ĉeĥa trad. Josef Rumler. Prago: Ĉeĥa Esperanta-Asocio, 1989. 36p. 21cm. Literatura suplemento al la revuo *Paco*. Frandinda gustumo de la moderna poezio en unu nacia lingvo, per 52 poemoj de 52 poetoj. 6,00 gld.

Unuecaj reguloj por la kontrakto pri la internacia fervoja transporto de varoj (CIM). Aldono B al Konvencio pri la internacia fervoja trafiko (COTIF). El la germana trad. Wilhelm Barnickel. GEFA, 1990. 92p. 21cm. 10,80 gld.

Valeurs socio-politique, pédagogique et culturelle de l'espéranto. Edward Symoens. El Esperanto trad. Huguette Lejeune, Germain Pirlot. Antwerpen (neindikita): ILEI, 1989 (neindikita). 44p. 20cm. 8,10 gld.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Kunm. Franz Okelmann. Bayreuth: la aŭtoro, 1990. 404p. 21cm. Simple farita sed ampleksa unudirekta vortaro. 24,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Filatelaĵo Ĉinio: Poŝtkarto 130-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Pekino: Pekina Esperanto-Asocio, 1989. Kun bildoj de ĉiuj Zamenhof-poŝtmarkoj, plus memoriga stampo kaj poŝtmarko el la Jubilea Jaro. 4,50 gld.

Filatelaĵo Sovetunio: Unuataga koverta Eroŝenko. 1990. 11x16cm. Portreto de Eroŝenko kaj surskriboj en la rusa kaj Esperanto. 3,00 gld.

Gluafiŝeto terglobo. Triesta Esperanto-Asocio, 1990. 12cm. Ripetoj de la vorto *Esperanto* en sferaspekta aranĝo; verdo sur blanko. 2,10 gld.

Kasedo: Antaŭ du jaroj. Kantas Tanaka Akiko, Kawamoto Hiromi. Tokio: TEKO, 1989. 60-minuta. Originalaj kantoj, pri i.a. Esperanto, amo kaj kare-manĝado, de Konisi Gaku, Miki Ŝikoŭ, Yasui Yosio, Nobukuni Hiroshi plus du tradiciaj. Unuflanke la kantoj, aliflanke nur la akompana muziko "por via kantado". 18,90 gld.

Kasedo: Invito al ĝojo. Nikolin'. Ĝenevo: Bendofako de LF-koop, 1987. Diversstilaj popularaj kantoj el pluraj landoj. 26,40 gld.

Kasedo: Sur placo de ĉiela pac'. Georgo Handzlik. Bielsko-Biala: la aŭtoro, 1989. Dumkoncerta surbendigo. Precipe originalaj kantoj de la konata pola gitaristo-kantisto. 22,80 gld.

Kasedo: Vivu Esperantujo. Georgo Handzlik. Pizo: Edistudio, 1989. Dek du kantoj, originalaj kaj tradukitaj, kun gitara akompano. Aparta tekstolibreto. 21,00 gld.

Monero 75-a UK arĝenta. Kuba Ŝtata Monfabriko, 1990. Diametro 38mm, diko 2mm, pezo 16,0g. Nominala valoro 5 pesoj. Unuflanke kongresa simbolo kun Zamenhof, aliflanke la ŝtata blazono. 75,00 gld.

Monero 75-a UK kupronikela. Kuba Ŝtata Monfabriko, 1990. Diametro 30mm, diko 2mm, pezo 11,2g. Nominala valoro 1 peso. Unuflanke kongresa simbolo kun Zamenhof, aliflanke la ŝtata blazono. 7,50 gld.

Motnaip-ludo. Didaktika kartludo por praktiki Esperanton. Terrassa: Tutmonde, 1990. 120 kartoj, per kiuj la ludantoj celas konstrui kompletajn frazojn el la lingvo-elementoj (radikoj, afiksoj, finaĵoj, pronomoj kaj ceteraj esencaj vortoj). Kun gvidlibretoj. 22,20 gld.

Poŝtkarto Esperanto Internacia Lingvo. Ĝurdevac: E-klubo Koko. 10x15cm. Verda surpriso. 2,40 gld. por 10 ekz.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Lingvo:

Nia rubriko "Reagoj" cedis sian lokon ĉi-numere al diversaj leteroj pri esperantigo kaj fonologio, kiel daŭrigo de la aprila lingvo-rubriko.

Venku libero kaj humuro

Laŭ Zamenhofo la fonetika skribado, ĝenerala trajto de nia lingvo, validas ankaŭ por propraj nomoj. Transe de tio troviĝas vasta regno de libero. Nenie Zamenhofo preskribis manierojn de nomo-asimilado. Ĉu tio ne kondiĉas reciproke toleremon?

Neniu povas malpermesi, ke esperantistoj parolas pri Karlareĝo kaj ne pri Charleroi, pri Kormonto kaj ne pri Herzberg, ke ili adoptas pseŭdonimojn aŭ rezistas kontraŭ altruditaj land-nomoj. Estas ja manio, ĉion voli dekrete reguligi. Verdiktas la vivo! La Goldena vojo kondukas al senfinaj disputadoj kaj kvereloj.

Estas simple erara la Goldena aserto, ke en la Leksara Kolekto "mankas klarigo pri la labormetodoj de la kompilintoj kaj la lingvistikaj principoj gvidantaj la asimiladon". Oni legu la antaŭparolon, la klarigojn por la uzado de la libro kaj la intermetitajn artikolojn, precipe sur la paĝoj 23, 61, 92, 96, 99, 110, 130, 137 kaj 140.

Ne mirigas, ke esperantigoj kiel Babilŝinko aŭ Porkvadejo ne plaĉas al sinjoro Golden; lia manko de humuro ja estas evidenta. Inter "Ojlenŝpigelo" kaj "Strigospegulo" mi senhezite elektas la duan formon.

Hermano Bermano (FR Germanio)

El la menciitaj klarigoj en la libro, ni publikigas ĉi-sube tiun de sur p. 110, laŭ propono de Rikardo Ŝulco. – red.

Nenio ajn komuna

En la februara numero (1010) de la revuo *Esperanto* sur la paĝo 36 mi legis jenan tekston: "Grigor G. Choutoff (1906-1989) forpasis meze de la pasinta jaro en Maabarot". Li estis mia tre bona kamarado – kaj ankaŭ bonega kaj fervora esperantisto. Ni ĉiuj – verdstelanoj en Israelo – priploras lian forpason. Kara amiko Griŝa – ripozu en paco!

Sed, kara redaktoro – Esperanto estas logika lingvo. En ĝi devas regi (absolute) fonetika ortografio. S-ano Griŝa estis rusdevena judo. Lia nomo

"Certe ne estos malbone, se ĝia prononco [de esperantigita nomo] estas tiom proksima kiom eble al la nacilingva prononco. Certe ankaŭ ne estos malbone, se ĝia ortografio estos tiom proksima kiom eble al la nacilingva ortografio. Certe estos rekomendinde, almenaŭ en specialaj kazoj, ke la esperantigita formo ankaŭ rilatu al la historio de la originala nomoformo. Certe ne estos malbone, se la esperantigita formo estas por esperantistoj tiom agrable prononcebla kiom eble. Certe estas evitinde, ke ĝi estu homonimo de alia Esperanta vorto. Certe estas evitinde, ke ĝia komenco aŭ fino estu la sama kiel Esperanta prefikso aŭ sufikso. Estas evidente, ke plej ofte en la praktiko tiuj diversaj postuloj reciproke sin malhelpas, sin ekskludas. Oni ne povas efektiveigi la maksimumon de ĉiuj, eĉ ne ekzistas metodo por eltrovi, kiu formo estus la optimuma rezultanto el ĉiuj. Laŭ mia persona sperto dum plurjara eksperimentado mi konvinkiĝis, ke plej bone oni traktu ĉiun propran nomon kiel unuopan individuan kazon. Tia ĝi fakte estas. Tio ne ekskludas, ke oni sufiĉe ofte povas procedi laŭ analogioj, sed estus iom stulte provi absolutigi iun tian procedon kaj rigore apliki ĝin ĉiam. Oni baldaŭ troviĝus en senelirejo.

estas slavdevena. Do lian nomon oni devas skribi jene: ŜUTOV. Kial do vi skribis ĝin per franca ortografio??? Nek li nek lia nomo havas ion ajn komunan kun la franca lingvo. Verŝajne li eĉ ne sciis la francan lingvon. Verŝajne li neniam estis en Francio. Do kial vi francigis lin? Do bonvolu skribi tion en la estonto jene: ŜUTOV.

Mi aktivas en la movado jam 53 jarojn. Ankaŭ mia forpasinta patro estis esperantisto. Do mi rajtas paroli, se temas pri ortografio – ĉu ne?

A. Ŝalamon (Israelo)

Estas interese noti, ke ISRAELA ESPERANTISTO (februaro 1990) same uzis la formon Choutoff. – red.

Estus ankaŭ iom stulte postuli, ke la esperantigita formo permesu inversigi la procedon, permesu mal-esperantigi ĝin, permesu ankoraŭ rekonigi en ĝi la originan formon. Tio ĝenerale ne estos ebla, nek necesa. Por ĝui dramon de




*Se paroli pri humuro . . .
En GEJ-GAZETO 1, 1987,
Thomas Bormann publikigis
satiran mapon de "ŝulcigita" FRG.*

Ŝekspiro aŭ por paroli pri ties aŭtoro, oni tute ne bezonas scii, kiu estas la nacilingva nomo de tiu dramisto. Tio fariĝas dezirinda aŭ necesa nur, kiam oni translimas Esperantujon. Sed tio ne plu koncernas la Esperantan lingvon.

Ĉiu unuopa esperantigo do devas esti krea ago, kaj ĝia rezulto unue ne povas esti pli ol provizora helpilo en la cirkonstancoj, por kiuj ĝi estas kreita. Ĝi unue povas esti nur nenio alia ol propono al la esperantistaro. Al kiu la propono ne plaĉas, tiu mem kreu aŭ uzu alian formon. En la lingvo estas forta tendenco, elimini maltaŭgaĵojn. Nur iom post iom la uzo de certa esperantigita formo ĝeneraliĝos, kaj tiam estos veninta la momento, en kiu ĝi eniros en la vortarojn kaj fariĝos definitive asimilita esperantero."

Rikardo Ŝulco
(Pledo por unueca lingvo, p. 174 kaj 175)



La marvirineto: simbolo de la dana ĉefurbo Komercesthaveno?

Kopenhago, Pekino, ŝinkoj kaj sekso

Mi naskiĝis en *København*. La ĉefoj nomas mian urbon *Kodaň*, la angloj *Copenhagen*, la francoj kaj hispanoj *Copenhague*, kaj la esperantistoj *Kopenhago*, sed neniuj havis la strangan ideon traduki la urbnomon *København* laŭ ĝia origina signifo: "La haveno de komercistoj". Mi trovas tute normala, ke la esperantista popolo tiel same kiel aliaj popoloj transskribas en sian lingvon la plej uzatajn proprajn nomojn de aliaj lingvoj, simple ĉar eĉ ni esperantistoj – tiel inteligentaj – ne povas lerni ĉiujn alfabetojn kaj ideografiojn en la tuta mondo. Ni lasu al la enloĝantoj de la koncerna lando la finan decidon pri la transskribo en

Esperanton, ekz. ĉu oni diru Pekino-n, Beijingo-n aŭ alimaniere.

Se en sia libro *Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj* s-ro Rikardo Ŝulco efektive kaj serioze, kaj ne nur ŝerce, tradukis *Chatham* en Babil-ŝinkon, jen vera katastrofo, ĉar "-ham" en nomoj kiel *Chatham*, *Birmingham* ktp ja ne signifas ŝinkon, sed hejmon (kaj "chat" en tiu urbnomo ne signifas babilon). Kiel s-ro Ŝulco tradukus la nomon de la angla provinco *Middlesex*? Ĉu Meza Sekso? Bedaŭrinde la signifo ne estas tiel ekscite interesa; la origina senco eŝas simple la meza saksa reĝlando.

Eskil Svane (kaj ne Diakasko Cigno) (Francio)

Nesolvoj de neproblemo

Denove ŝtormas en nia movado la diskutaĉo pri esperantigo (aŭ ne) de la fremdaj nomoj.

Jam delonge mi ricevis la impreson, ke multaj esperantistoj emas pavi kiel superperfektistoj, ke ili ofte aplombas esti pli papistaj ol la papo. La problemo kiel asimili, grafike kaj fonetike, la proprajn nomojn, aparte onomastikon, ekzistas de ĉiam en kiu ajn nacia lingvo, kie tamen jam delonge oni rezignis solvi ĝin. Tiel forpasis la tempoj, kiam, en mia lingvo, Descartes fariĝis Cartesius aŭ John Lockwood kripliĝis al Giovanni l'Acuto. Nun, en ĉiuj civilizitaj landoj, la fremdaj nomoj aperas en libroj kaj gazetoj kiel skribitaj (aŭ latinalfabetigitaj) de la koncernatoj. Sed la esperantistoj ne, ili volas esti superaj al ĉiuj, ili strebas esperantigi ĉion.

La kutimaj argumentoj por pravigi tiun obstinon estas ĉiam la samaj. Unue oni citas la faman rekomendon de Zamenhof, forgesante, ke la Majstro mem, iom post iom, malatentis kaj ne plu aplikis tiun sian principon. Aŭ oni lamentas la neblon scii, kiel prononci skribitajn fremdajn nomojn, kiel Nagy, Kynĉl, Grzębowski, Xiaojun, Verstraeten, ktp. Sed, mi demandas, kiu kutimas legi librojn kaj gazetojn laŭtvoĉe? Kiam mi legas – en Esperanto aŭ en mia lingvo – mi simple *rigardas* la fremdajn nomojn, sen klopodi elparoli ilin. Nur kiam mi havis la neceson (aŭ deziron) scii la ĝustan prononcon de nomoj el nekonataj lingvoj, mi simple demandis la posedantojn (aŭ samlingvanojn). Tiel por Szerdahelyi, Nagy, Pilger, ekzemple.

Kaj ni ne taksu la esperantistan popolon kiel subevoluintan, malkleran kaj malpoliglote mam kolektivon, kiu nepre bezonas la ŝulcajn leksarojn por kapabli sin esprimi internacive! Dum partopreno en 20 Universalaj Kongresoj *nur unu fojon* mi aŭdis prononci mian nomon per malmolaj, plozivaj-velaraj g-oj (malgraŭ tio, ke la mola sono ĝ ne ekzistas en multaj lingvoj).

Do, laŭ mi, estas tute sence pretendi, ke iu ajn verkisto, tradukisto, artikolverkanto aŭ simple korespondanto konu – kaj esperantigu regule (rekte aŭ interkrampe) – la parolmanieron de miloj da lingvoj. Tiuj, kiuj klopodis tion fari, simple kreis monstraĵojn (kiel reliefigis Roland

Schnell kaj Bernard Golden en la aprila numero). Ja, la ĝisnunaj provoj kreis nur kaoson, la aplikitaj kriterioj estas ofte konfuzaj, nesciencaj. Kiel klarigis Szerdahelyi (*Literatura foiro*, aprilo 1971), ofte oni transkodigas sur grafika nivelo (Nev-Jork, Istvan), aliffoje sur fonema nivelo (Nju-Jork, Istvan), aliloke sur morfema nivelo (Novjorko, Stefano), aŭ eĉ sur leksema nivelo (Nova Urbo, Monto Blanka). Terure! Iam cirkulis en niaj rondoj humuraĵo, laŭ kiu grupo da esperantistoj ĉe kongreso malkovris, ke ĉiuj

*“Ni ne taksu la
esperantistan popolon
kiel subevoluintan, mal-
kleran kaj mal-
poliglotemam kolektivon,
kiu nepre bezonas la
ŝulcajn leksarojn por
kapabli sin esprimi.”*

loĝas en la sama urbo: Novkastelo. Nur post klarigoj evidentiĝis, ke ili venis respektive el Neuenburg, New-castle, Neuchâtel, Châteauneuf, Castelnovo, ktp.

Sen paroli pri tiu lavango da finaj o-oj (Zamenhofo, Bermano, Ŝulco), kiu monotonigas ĝis naŭzo nian “belsonan lingvon”.

Ni ankaŭ ne forgesu, ke la sonoj ekzistantaj kaj uzataj en la mondaj lingvoj estas kelkaj centoj, dum la Esperanta alfabeto liveras la eblecon elparoli 26 fonemojn (plus plurajn sed gramatike seninfluaĵajn variaĵojn). Sekve klopodi esperantigi senescepte (kun sufiĉa simileco) la elparolon de ĉiuj ekzistantaj sonoj, nur pere de la literoj de nia alfabeto, estas simple revo. Ĉu enkonduki novajn literojn kaj diakritojn, kiel proponas Joe Gamble? La rimedo estas pli malbona ol la difekto; mi certas, ke niaj kursanoj forkurus teruritaj post la unua leciono!

Cetere mi legis la fakegajn esojn de Bernard Golden kaj Wouter Pilger, respektive pri esperantigo de la hispanaj kaj nederlandaj nomoj. Se tiu modo disvastiĝos al ĉiuj naciaj lingvoj, mi troviĝus en la neceso reiri al intensa studado dum kelkaj jaroj, nur por lerni kiel skribi kaj prononci la fremdajn nomojn. Ne, dankon!

Konklude, neniuj, nek en la naciaj lingvoj nek en Esperanto, sukcesis ĝis

nun proponi kontentigan solvon. Do la problemoj estas nesolveblaj, sekve *ne-problemo*. Ni lasu do en paco la Kazimierz kaj la Neunschweinstein, kaj la legantoj elparolu la fremdajn nomojn, kiel ili preferas; tio nemulte gravas kaj nemulton lezas. Kaj nur kiam nepre necese (ekzemple en tekstoj por teatro aŭ por blinduloj) – *kaj kiam sciante* – oni indiku interkrampe la proksimuman prononcon.

Ĉiukaze mi koncedus al neniuj la rajton modifi ĝis grotesko kaj nerekonobleco la plej intime afekciajn valorojn de ĉiu homo: lian propran nomon. Miaj franclingvaj amikoj neniam senpudoris skribi al mi: “Chèr des Djordji”, aŭ la angloj: “Dear da George”.

Do, ĉiu rajtas masakri sian propran nomon kaj amuzi legantojn, sed mi deziras kaj apelacias, ke mia nomo restu, laŭpasporte kaj sendifekte,

Aldo de'Giorgi (Italio)

P.S. Rikardo Ŝulco monotone alvokas al apliko de logiko kiel sola gvidilo. Sed kiun kaj kien logikon? Laŭ mi ĉiu lingvo posedas sia(j)n propra(j)n. Ekzemple, en la citita frazo de Zamenhof: “La logiko kategorie ordonas, ke . . .”, kiu logiko kuŝas en la vorto “kategorie”? Ĉu ne, ĉi-kaze, tute senlogika, blinde uzita eŭropismo?

Ĉi tiu kontribuo rilatas sufiĉe proksime al la ĝenerala temo por aperi ĉi tie, kaj ja meritas pensigi nin. – red.

Literaĉo ‘r’ estu arestita

Tion mi petas de lingvistika polico de Esperanto aŭ iu normiga aŭtoritato. Tiu damnita litero estas kelkvizaĝulo kaj tio ja ne estas permesata en nia amikeca mondo de Esperanto.

Ĉu ni ne pretendas, ke nia lingvo estas “lingvo de la normoj, de la senescepteco” ktp? Se jes, ni devas zorgi, ke ĝi ne devojiĝu, kaj ne perdu siajn normojn kaj senesceptecon.

Ni pretendas, ke “oni ne renkontas ortografiajn problemojn en Esperanto”. Do, ĉiu fonemo devas skribiĝi per nur unu signo kaj ĉiu signo devas simboli ununuran fonemon. Kian sonon la litero ‘r’ simbolas? Kia estas la norma prononco de la litero ‘r’? Ĉu tia, kia ĝi estas difinita en la vortaro PIV, kiel “voĉa, vibranta likvido”? Se jes, ĉu ni rajtas prononci ĝin alie? Kaj ĉu tio ne difektas la lingvon?

Al mi kiel iranano tute ne gravas, kia estu ĝia ĝusta prononco, sed ege gravas, ke *ĉiu samideano prononcu ĝin same*. Se ni montrus la norman

Ne panaceo, sed normigo

Jen naŭdek-naŭa panaceo por plibonigi Esperanton: temas pri “Latin-litera Esperantokonforma Interfonemaro” de Ĝo Ĝembll (*Esperanto*, aprilo 1990, p. 82).

1. S-ro Ĝembll eĉ ne konas la distingon inter fonetiko kaj fonologio.

2. La ortografio estas por la fonologia, ne por la fonetika priskribo de lingvo.

3. Por montri prononcon, la internacia fonetika alfabeto estas la malplej malperfekta sistemo, kiu ekzistas. En kiu senco ĝi estas francisma? Nia prezidanto, la fonetikisto doktoro Wells, uzas ĝin.

4. Por doni proksimuman prononcon de neesperantaj nomoj en Esperanta kunteksto, oni devas sin limigi strikte ene de la Esperanta fonetiko. La sola problemoj, kiu restas, estas kiujn fonemojn Esperantajn oni respondigu al la etnaj: tiu de la normigo. Ekzemple, oni skribas *t*, *s* aŭ *f*

por la angla *th*. Enkonduki *t* kaj similajn galimatiasojn estas komplete sensence kaj noce. Tio, kion oni devus fari, estas elekti inter la supraj tri. Unu escepto al la Esperanta ortografio estus espereble la meto de la akcenta signo sur la neesperante akcentita vokalo, kiu praktiko estas sekvata en la *Fundamenta krestomatio*.

5. La japana skribo ne estas “mirinde fonetika”, ĝi estas fonologia (aŭ morfofonemika).

6. S-ro Ĝembll skribas la japanan *Kyûsyû* [Kjûŝuu (kiel mi kutime notas)] kiel “Kyuŝu”, sed fonetike *u* [u] ne estas *û*, nek *sy-* [s] ŝ, kaj kie estas la akcento?

Yamasaki Seikô [Jamásaki Séjkoo]
(Japanio)

La iom nepreciza uzo de “fonetika” kun la signifo “fonologia”, “morfofonemika” ktp. estas tradicia (i.a. ĝi troviĝas en PIV). – red.

prononcadon de tiu litero per 'r' kaj ne-norman per 'r', bedaŭrinde aŭ feliĉe en nia lingvo, kiel en multe da aliaj orientaj lingvoj, ni havas kaj r kaj r kaj en nia alfabeto du literojn simbollantajn tiujn du sonojn, kiuj estas tute memstaraj literoj kaj neniel rilatas unu al la alia. Se oni anstataŭigus r per r aŭ male, la signifo de la vorto tute aliĝus aŭ perdiĝus. Mi donu kelke da ekzemploj el nia lingvo:

	bar	= ŝarĝo
dum	baŝ	= ĝardeno;
	raz	= sekreto
dum	ŝaz	= ansero;
	dur	= malproksima
dum	duŝ	= buteraĵo;
	razi	= konvinkita
dum	ŝazi	= batalisto;
	dar	= pendumilo
dum	daŝ	= varmega;
	marz	= limo
dum	maŝz	= cerbo;
	tarzije	= konvinki
dum	taŝzije	= nutri.

Ofte okazas, ke tiuj du literoj troviĝas en unu sama vorto jene:

reŝbat	= inklino
fareŝ	= eksokupiĝanto
ŝorbat	= fremdeco
ŝorur	= egoismo
ŝar	= kavo
raŝ	= kampo.

En multe da vortoj tiuj du literoj sidas unu ĝuste ĉe la alia:

ŝorŝoru	= plendemulo
maŝreb	= okcidento
tarŝib	= emigi
morŝ	= kokino, birdo.

Do, ni al kutimiĝis al tiu principo, ke, kiam parolanto anstataŭigas r per r aŭ male, li verŝajne intencas priparoli tute alian aferon. Ekzemple se parolanto anstataŭigus la literon *v* de la vorto *varo* per *m*, ĝi fariĝus *maro* kaj la aŭskultanto certe ne plu pensus pri *varo*. Se tio okazus en frazo, la aŭskultanto sendube cerbumus. Ekzemple: ĉiu vendisto portis sian maron al la foiro!

Povas esti, ke la vorto tute sensignifiĝus, tiam la aŭskultanto cerbumus pli profunde. Fakte tia misprononcado multe malhelpas la komprenadprocezon, se ĝi ne haltigas ĝin!

Dum la roterdama UK, mi renkontis francan instruistino, kiu parolis ĝustan Esperanton tre bone. Je mia mira demando ŝi komentis, ke ankaŭ ŝi kredas je normoj, kaj aldonis:

"Ĉiuj francoj aŭ germanoj povas paroli norme. Ili simple ne klopodas. Ĉiuj miaj ĝelernantoj parolas korekte, kvankam ili komence esprimas malpovon."


Rimarkindas ja ankaŭ alia afero: la litero 'r' erarigas parte niajn samideanojn francajn, germanajn aŭ anglajn, ĉar ĝi similas al signo el ilia alfabeto, kiu simbolas tute alian fonemon. Do, vidante la literon 'r' en Esperantaj tekstoj, ili elbuŝigas francan, germanan aŭ anglan sonon de tiu signo, dum ĝia Esperanta sono estas efektive ja alia.

Sed, se tiu simileco pravigus tian misprononcadon, ankaŭ aliaj samideanoj ekhavas pravigilon por misprononcado. Ekz. niaj nederlandaj samideanoj prave povus anstataŭigi g per ĥ, irananoj kaj araboj rajtas vidinte la signon 'b' elbuŝigi la fonemon 't', ĉar en la persa aŭ araba ortografio la

fonemo 't' skribiĝas ankaŭ per 'b'-simila figuro. Hispanoj, danoj, ĉinoj, japanoj kaj alilandanoj povus havigi al si samajn rajtojn. Estas granda difekto por nia internacia lingvo, se oni parolus ĝin ĉinece, japanece, hispanece, germanece, francece, anglece, usonece, danece, nederlandece . . . kaj kelkfoje ja Esperantece! Se tio daŭrus, ĉe la fino de la dua jarcento aŭ pli frue ni havos lingvojn Espelanto, Hiŝperanto, Esperŝanto, Iŝpeŝanto, Ezberando, Espëräntö kaj multe da aliaj eks-Esperantoj, kies parolantoj ne povas kompreni unu la alian sen helpo de tradukisto, kaj la lingvo fariĝos Esperlnto.

M. E. Samanipur (Irano)

Bazan kontribuon al la fonetika klerigo de la esperantistoj faris John Wells per la dua ĉapitro de LINGVISTIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTO.



Nova epoko, nova postulo

La teknika evoluo invadis ankaŭ la vivon de la esperantista merkato. Dum la lastaj jaroj la esperantlingvaj sonbendoj kaj eĉ la vidbendoj en pluraj landoj eniris la merkaton kaj la prezoj jam estas akcepteblaj.

Do la tempo jam maturiĝis por paroli pri la kvalito kaj enhavo de surbendigitaĵoj. Nun mi tuŝas nur unu parteton de la analizendaj elementoj de la temo, nome la akcenton de la parolantoj. La sperta orelo tuj divenas la landon de la parolanto-kantanto, ĉu hungara, ĉu franca, ĉu japana, sen iaj ajn skribaj indikoj. La diferencoj feliĉe estas plejparte nur tiel malgrandaj, ke la komprenon ĝi ne malhelpas.

Sed – feliĉe aŭ bedaŭrinde – la surbendigitaĵoj servas ne nur la amuzon, sed ankaŭ la lernadon de la lingvo. Do vole-nevole ili rolas ankaŭ kiel parolmodelo de Esperanto. Kaj, se hazarde la parolanto lernis Esperanton de dialekte-kartave parolanta instru-

isto, tiam la sonbendo povus fariĝi falsa lingvo modelo por la tuta Esperantio.

Ĝis nia jardeko tia minaco preskaŭ ne ekzistis, sed hodiaŭ jam ne nur en la kursoj sed ankaŭ en la hejmo de esperantistoj estas uzataj la multtekostaj kasedoj. Pro tio la tempo urĝas! Kaj la tasko estas honora kaj por lingvistoj kaj por instruistoj de nia movado: prilabori la normojn de la akcento de la lingvo Esperanto kaj produkti ĝin por la lernantoj kaj ankaŭ por la artistoj, kantistoj kaj aktoroj.

Kompreneble produktado de tiu normo povas okazi post scienca analizo de la akcentmaniero de diverslingvanoj kaj la ĝisnunaj atingoj de la esperantologio. Kaj la subvenciado de ĉi tiu agadprojekto verŝajne povus okazi ankaŭ pere de ekstermovadaj rimedoj pro ĝia eventuala pli larĝa utilo.

Oszkár Princz (Hungario)

Foliume

La vero eternas, feliĉe

Krampite meze de la plej freŝa numero de *Scienca revuo* (n-ro 155, 1988) troviĝas bulteno de la aŭspicianta asocio, ISAE, kiu portas la daton "marto 1990". "ISAE denove trovas grundon sub la piedoj," deklaras la anonima aŭtoro, "kaj ne nur kapablas ekspedi vol. 39 (1988), sed antaŭ la kongreso en Havano ankaŭ vol. 40 (1989)." Ĉar ekzistas ankoraŭ 6 000 ekzempleroj de numeroj el la lastaj jaroj, ISAE ekde nun presos nur tiun kvanton, por kiu ĝi ricevis mendojn; per similaj "radikalaj rimedoj", oni esperas "sanigi kaj revigligi la Asocion".

La ok artikoloj en la menciita numero konsistigas kuriozan miksaĵon, kiu ne rimarkeble suferis pro sia dujara atendado. (Unu el la tekstoj fakte devenas el la Universala Kongreso de 1977!) "Ekonomiaj teorioj de justeco" (Wickström) kaj "Komunikiĝo inter bestoj" (Støp-Bowitz) estas facile legeblaj prelegotekstoj, taŭgaj por ĝenerala publiko sed ne dirantaj multon al fakuloj. Samnivela, sed en malpli facila lingvaĵo, estas "Alkoholo kaj krimfarado" (Carlevaro). "Sensentigo – la metodo kuraci anksiecon" (Tybłewska-Kundicz) kaj "Kelkaj problemoj pri komunikado" (Andres) simple lanĉas ideon kvazaŭ en konversacia rondo, partoprenebla por ĉiuj, dum "Aŭtomata rego de oksigena fluo por novnaskitoj" (Mills) kaj "Scienca objekto kaj metodoj de la fakdidaktiko" (Brockmeyer) alparolas la iniciatojn en nepenetrebla faklingvaĵo. Eble plej interesa, rilate al la scienca agado en Esperanto, estas "Interkompreniĝo per agoj kaj sentoj" (Tybłewski), kiu resumas esplorojn pri la interrilatado inter diverslandaj esperantistoj dum "sentivigaj ekzercoj". La artikolo estas ĉerpita el pli ampleksa esploro publikigita en 1984.

Nekrologoj

Patricia HOLT (1925-1990), dumviva membro de UEA, forpasis la 21-an de januaro en Sandown, Anglio.

Feiko MUNNIKSMAN (1915-1990) forpasis la 27-an de aprilo en Annen, Nederlando. Li estis la ĉefredaktoro de *Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj* (Kluwer, 1974), unu el la plej imponaj terminaroj iam kompilitaj per Esperanto.

Oluf OLSEN (1890-1990) mortis la 23-an de marto. Esperantisto ekde 1907, li dum multaj jaroj kompostis *Norvega esperantisto* kaj ĉiujn aliajn presaĵojn de la norvega movado. Li estis estrarano de Eldonejo Esperanto, kaj ĝis la fino restis aktiva korespondanto.

Interesitoj povas mendi tiun kolekton kontraŭ 20 svisaj frankoj per la konto "isae-z" ĉe UEA, aŭ rekte ĉe R. Hauger, Ringstrasse 13, CH-8172 Niederglatt/Zürich, Svislando (pĉk 80-5909-0 "Pro ISAE").



Plaĉi aŭ neplaĉi, tio ne gravas

Post gazetaraj komunikoj kaj diversaj onidiroj, finfine la Esperanto-rokmuzika asocio Eurokka atingis definitivon pruvon de sia ekzisto – *Rok-gazet*, aŭ "la unuan Esperanto-rok-fangazeton". Sur ĝiaj paĝoj oni trovas (eĉ fote!) la konatajn Kajton, Team', Persone, Amplifiki, T.B.C., malpli konatan Kredon (Sovetunio) kaj diversajn surprizajn individuojn kaj grupojn en Argentino, Pollando, Sovetunio, Ĉinio, Zairio k.a. Kvankam la lingvaĵo kaj prezento ne estas tre altnivelaj, la vigleco kaj internacieco de la enhavo kompensas multon. (Cetere, vidu la devizon supre, ĉerpitan el la enkonduko!) Muzikemuloj nepre anoncu sin ĉe la redakcejo: p/a Eurokka, F-31450 Donneville, Francio. Jarabono (kvar numeroj) kostas 100 FF aŭ 32 irk (gld.).

Post 70 jaroj, ankoraŭ triumfonta

Heroldo de Esperanto festas ĉi-jare sian 70-jaran datrevenon, kaj baldaŭ atingos sian 30-an jaron sub redaktoro Ada Fighiera-Sikorska. (En la 85-jara historio de Esperanto, neniun redaktoro superis 20 jarojn!) Apenaŭ necesas prezenti tiun grandformatan, varie (iuj dirus: ĥaose) enpaĝigitan kaj tre popularan gazeton, kiu pleje memorigas tiujn urbajn kaj kvartalajn semajngazetojn konatajn tra la mondo, plenajn je la faroj kaj fanfaronoj de la loka loĝantaro.

Lastatempe la plioftiĝo de *Budapeŝta informilo* ĝis dusemajna aperado devigis *Heroldo*-n modifi sian fieran pretendon esti "la plej ofta gazeto de la Esperanto-movado", per aldono de la kvalifiko "sendependa". Memorante la iamajn provojn kunfandi ĝin kun nia revuo, ni deziras al ĝi ankoraŭ multajn jarojn da sendependeco!

Frukto de interpopola aktivado

Sekvindan ekzemplon montris esperantistoj el la ĝemelaj urboj Wakayama (Japanio) kaj Jinan (Ĉinio). Tanaka Masami, Hatanaka Hiroshi kaj Egawa Harukuni aperigis en 1985 folkloran kolekton, *Malnovaj rakontoj el la urbo Ŭakajama*, "por konigi la kulturon de Wakayama vaste en la mondo". La libro trovis eĥon en tre diversaj landoj, i.a. ĉe loĝanto de Jinan, Sun Bo. Tiu tradukis ĝin en la ĉinan, kaj la tajposkripton presis kaj bindis la japanaj aŭtoroj. "Ni esperas, ke ĝi helpas al la reciproka kompreniĝo inter ambaŭ urboj", skribis la kunlaborantoj, renkontiĝintaj ĉe la 71-a Universala Kongreso en Pekino.

Ponteto al Ĉinio

Alian fenestron al la rilatoj inter japanaj kaj ĉinaj esperantistoj oni trovas en *Ponteto*, la revuo de Esperanto-Ligo en regiono Kantô (Japanio). En la februara numero aperis la tria parto de longa diskuto inter Qiu Guanjin (Ĉinio) kaj Kurisu Kei, pri la sinteno de la ĉina registaro al la studenta pordemokratia movado. Oni bedaŭras ne povi legi pli ofte tiajn malfermitajn interŝanĝojn, kiuj komprenigus Ĉinion al eksterlandanoj ankoraŭ pli efike, ol *El popola Ĉinio*.

Rumanaj romanoj (k.a.) eldonotaj

Internacia Kultura Servo de kelkaj jaroj prilaboras "Balkan antologion", por kiu ĝi kolektis amason da bona materialo. Nun ĝi tamen renkontis la limojn de financado. Pro tio ĝi lanĉos la unuopajn landojn aparte, komencante per *Rumana antologio*. Tiun kompilaĵon de poezio kaj prozo el la 20-a jarcento redaktis Constantin Dominte kaj Jozefo Nagy; duono de la necesa sumo estas jam certigita de Adam Goralski (Kanariaj Insuloj). Por la cetero, tre bonvenas antaŭmendoj, donacoj, kaj ankaŭ enpagoj por sendi stokon poste al Rumanio. La libro estas mendebla kontraŭ 9,90 gld: pagu pere de UEA, kun indiko "IKS/Fondaĵo Rumana Antologio".

HEROLDO DE ESPERANTO

LA PLEJ OFTA SENDEPENDA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

1990-1991

Antaŭ 70 jaroj ESPERANTO TRIUMFANTA

Pliaj esperantistaj kongresoj kaj internaciaj renkontiĝoj en 1990

"Ekspolingvoj" en Parizo

Natura medicino

Pacifiko unuigas

Heroldo de Esperanto

Heroldo de Esperanto

Heroldo de Esperanto



Ĉinio: Scienca agado en Ŝanhajo

La Unua Ŝanhaja Simpozio pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto allogis 148 partoprenantojn al tutsemajna diskutado de la 5-a ĝis la 11-a de majo. La temoj inkluzivis i.a. "La kuracado de aidoso per tradicia ĉina medicino" (Cui Ziqin), "Ĉela biologio havas novajn konceptojn" (Ouyan Donglian), "Psikologio en Ĉinio" (Tian Peimin), "La historio de Ŝanhaja filmtekniko" (Xu Jinbo). Ne mankis diskuto ankaŭ pri la ĉina E-movado. La simpozio reflektis la enradikiĝon de Esperanto en Orient-Ĉinia Normala Universitato, kie laboras aŭ studas la granda plimulto de la partoprenintoj.

Francio: Kulturplena kongreso

La 82-a Franca Kongreso okazis en la prestiĝa konferencejo Kastelo de Blois, en la hejmurbo de la ministro pri kulturo kaj komunikado, Jack Lang (alta protektanto de la kongreso). Ampleksa kultura programo alternis kun viglaj diskutoj: en la komitato kaj inter la provincaj E-organizaĵoj, en la kunvenoj de la verduloj, la instruistoj, Eŭropa E-Unio ktp. Partoprenis ankaŭ dudeko da eksterlandanoj.

Litovio: Per aliaj ondolongoj

Malfrue venis korekto al la radiotabelo, kiu aperis en la maja numero. Lunde, de 23h00 ĝis 23h30 UTC, Radio Vilnius elsendas per jenaj ondolongoj: 25.45m (11790 kHz), 21.99m (13645 kHz), 19.76m (15180 kHz), 19.41m (15455 kHz), 19.37m (15485 kHz). La ĵaŭda elsendo restas senŝanĝa.

Nepalo: Instruo per UNICEF

Masahiro Marc Ono, kiu lernis Esperanton en Kalifornio (Usono), nun laboras ĉe la nepala oficejo de la branĉo de UN ŝarĝita de infanprizorgo, UNICEF. En Kathmandu li trovis, ke multaj homoj "deziregas lerni Esperanton". Laŭ la petoj de lokaj movadanoj, li nun entreprenis kursojn por komencantoj kaj progresantoj.

Pollando: Ĝui silezian gastamon

En Silezio, sudokcidenta regiono de Pollando ĉirkaŭ la provinca ĉefurbo Wrocław, agas pli ol 20 Esperanto-grupoj kun kelkaj miloj da membroj. Vroclava E-Klubo nun organizis Silezian Esperantistan Gastoservon (SEG) kaj eldonas regule adresliston de movadanoj, kiuj kontraŭ modesta pago disponigas sian loĝejon al

eksterlandaj esperantistoj. La servo krome organizas grupajn renkontiĝojn, aranĝas rondvojaĝojn ktp. Petu regularon kaj aktualan adresliston ĉe la klubo, Pk. 16, str. Dubois 3, PL-50-952 Wrocław 17, Pollando.

Rumanio: Progreso sur multaj frontoj

En julio okazos la unua kongreso de Rumana E-Asocio, ĉe la Universitato de Timișoara. La Asocio jam klopodas starigi filiojn en plimulto de la 40 distriktoj de la lando, kvankam la longa interrompo en kontaktoj ofte malhelpas tion. La Ministerio pri Klerigado nuligis la malpermeson je la instruado de Esperanto (el 1985) kaj konfirmis, ke oni rajtas instrui la lingvon en ĉiuj universitatoj, teknikaj kaj aliaj altlernejoj. En Timișoara en septembro okazos la unua kurso por Esperanto-instruistoj.

Prof. d-ro Helmar Frank, la gvidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, vizitis Rumanion inter la 19-a kaj la 21-a de majo. Laŭ interkonsento kun la ministro kaj vicministro pri klerigado, oni fondis AIS-filion en la Universitato de Sibiu kaj esploras la fondon de dua filio en Timișoara. Ni ankoraŭ ne havas informojn pri la planitaj agadoj de la du filioj.

Fake

Esperantologio: Kiu eldonos Golden?

De pli ol du jardekoj, akademiano Bernard Golden aperigas artikolojn, eseojn kaj leterojn en pli ol 100 periodaĵoj de la Esperanto-movado. Li nun serĉas eldonisto(j)n por laŭtemaj serioj el tiu verkaro: i.a. pri esperantologio, movadhistorio, instruado de Esperanto, literaturo, interlingvistiko, arkeologio, kulturhistorio, Afriko. En ĉiu serio ekzistus kelkaj specifaj subtemoj, eldoneblaj kiel apartaj kajeroj. Laŭ li, "ne estos necese rekompsti ĉiujn verkojn, ĉar la jam publikigitaj tekstoj plejparte povas esti represitaj per ofseto. En kazo de neceso eraroj estos korektitaj en la teksto aŭ piednote, kaj ĉiuj bibliografioj estos ĝisdatigitaj." Organizaĵo aŭ eldonejo, kiu deziras entrepreni publikigon de "goldenaj", bonvolu kontakti la aŭtoron ĉe Damjanich u. 1/C, I.8, H-8200 Veszprém, Hungario.

Radio: Gajnintoj en Havano!

En la konkurso de Radio Havano Kubo, pri la verkado de eseo pri la signifo de la 75-a (kuba) UK, partoprenis 42 esperantistoj el 26 landoj el ĉiuj kontinentoj. La ĉefpremion – senpagan vojaĝon al kaj partoprenon en la 75-a UK – gajnis brazilano Clovis Alvas Portes, pro la "originaleco kaj ideriĉeco" de sia



Germana DR: Pri unuiĝo en Brandenburg

De la 25-a ĝis la 27-a de majo okazis la 5-a Centra Renkontiĝo de GDREA, en Brandenburg, okcidente de Berlino. Partoprenis ne nur ducento da orientgermanoj, malgraŭ la tumultaj evoluoj en la lando, sed ankaŭ pluraj eksterlandanoj, inkluzive de sep-persona grupo de junaj mongoloj, lernintaj Esperanto nur ekde januaro (foto). La ĉefa temo de la diskutoj estis kompreneble la ekonomia kaj politika unuiĝo de Germanio. Delegacio de GEA, inkluzive de ties prezidanto, Wolfgang Schwanzer, prezentis la situacion de la okcidentgermana movado kaj kundiskutis kun GDREA la vojon al pli proksima kunlaboro.

Persone

Casey: Ekspozicie en Parizo

Inter la pentraĵoj de la ekspozicio "Perspektivoj Sandiego", de la 18-a de junio ĝis la 7-a de julio ĉe la Fonduso Mona Bismarck en Parizo, troviĝis olepentraĵo de Zamenhof. Ĝi estas kreaĵo de esperantistino Alberta Casey, konata ĉefe pro sia kantado ĉe la Universalaj Kongresoj kaj sur la sonbendo/disko *San Diego vokas*. En mallonga sinprezento en la ekspozicia katalogo, ŝi aparte mencias la temon de monda komunikado.

Einstein: Cent jaroj post la morto

Ne, temas ne pri Albert, la granda sciencisto, sed pri Leopold, pri kiu Zamenhof komentis, ke "lia nomo devas esti enskribita per oraj literoj en la historio de Esperanto". Sub lia gvido, la volpukista

konkursajo. Donacojn krome ricevis: Abraham M.U. Sebastino (Niĝerio), Luis A. Peralta, Ligia M.G. de Barragan (ambaŭ Kolombio), Miĥail Peŝinov (Bulgario), Gamvir Man Ŝresta (Nepalo), P.V. Ranganayakulu (Bharato), Genadi Kulagin (Sovetunio), Cezary Olmjanaczyk (Pollando), Juan Fontecha Soto (Hispanio) kaj Petro Kaiz (Ĉinio).


Leteroj kompreneble ĉiam bonvenas ĉe la radioredakcio: Radio Havano Kubo, Esperanto-redakcio, Pf. 7026 aŭ 6240, Havano, Kubo.

Teatro: Rumanoj turneos post PIF

La plej fama rumana pupteatro "Tandarica" el Bukareŝto preparas marionetan programon en Esperanto por partopreni en la ĉi-jara Pupteatra Internacia Festivalo, de la 31-a de aŭgusto ĝis la 4-a de septembro en Zagrebo, Jugoslavio. Ilia prezentaĵo "La ganto" estas farita laŭ la fama poemo de la plej granda rumana klasikulo Mihai Eminescu. Ĝi celas infanan publikon (8-12 jaroj). Poste la trupo pretos gastigi ekster Jugoslavio: Se E-aranĝoj en Italio, Aŭstrio aŭ Hungario ŝatus inviti tiun imponan 10-aktoran spektaklon, ili bonvolu kontakti Internacian Kulturan Servon, Amruŝeva 5, YU-41000 Zagreb.

Vidbendoj: Mendebila Esperanto-servo

Manfred Kirsch (GDR) dediĉas sin, ekde nelonge, al profesia vidbenda servo, kiu deziras priservi la E-movadon. Eblas mendi vidbendojn en Esperanto (ne nur) de "viaj privataj, regionaj, internaciaj aŭ landaj renkontiĝoj, konferencoj kaj festoj laŭ viaj deziroj kaj imagoj". La kondiĉoj inkluzivas veturadon, tranokton kaj manĝojn, pri kroma pago (principe en iu ajn valuto) oni interkonsentas aparte. Kontakto Videostudion "Video-Kirsch", Brandstr. 21, DDR-7420 Schmölln, Germana DR; tel. (40291) 3400.



klubo de Nürnberg (FRG) transiris al Esperanto en decembro 1988, fariĝante la unua Esperanto-klubo en la mondo. Esperanto-Grupo Nürnberg metos memortabulon ĉe la domon, kie li loĝis, en ceremonio la 9-an de septembro – precize cent jarojn post lia morto. Partoprenantoj bv. anonci sin ĉe la grupo, Pirkheimer Str. 11, D-8500 Nürnberg 10, tel. (0911) 33 93 73 kaj 35 96 58.

Trixi: Ankaŭ ekster Eŭropo

Magiisto Trixi ne laciĝas de siaj vojaĝoj kaj magiadoj. Post sukcesaj prezentoj en Eŭropo, li trovis varman akcepton ĉe publiko en Ĉinio kaj Bharato. En germanlingvaj medioj, lin popularigis lia libro *La magiisto kun la blua ŝtono*. Dum siaj turneoj s-ro Trixi volonte faras magiprezentojn en Esperanto. Kontaktadreso: Hansjörg Kindler-Trixi, Halleweg 55, D-4790 Paderborn, FR Germanio.



Kalendaro

konstante

Esperantotur-direkcio, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

Internacia Kultura kaj Kleriga Centro, Sobotské namestie 6, CS-058.01 Poprad, Ĉeĥoslovakio

Espertur, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario; tel. (1) 156-0244; telekso 226490 "Műszaki Könyvkiadó/Espertur" Esperanto-sekcio de Vojaĝoficejo Express, Pf. 567, H-1395 Budapest 62, Hungario; tel. (1) 132-3945 kaj (1) 131-7777/22; telekso 225384 turex h; telefakso (1) 153-1715

Kultura Centro Esperantista (KCE), Pf. 771, CH-2301 La-Chaux-de-Fonds, Svislando Esperantoturist, str. Positano 40, BG-1000 Sofio, Bulgario; tel. (003592) 882472; telekso 23599 kabini bg

Esperanto-Vojaĝoservo de Usono, p/a Howard Travel Service, 578 Grand Avenue, Oakland, CA 94610, Usono; tel. (415) 836-1707; telekso 49573388 htv ui; telefakso (415) 834-1019

septembro

23-29: Eŭropa Esperanto-Forumo, Bidgoŝto kaj Bjalistoko, Pollando (Esperantotur, adreso supre; seminarioj pri socipolitikaj ŝanĝoj kaj movada evoluo kaj kunlaboro, plus diversaj turismaj aranĝoj; frua aliĝo petata)

decembro

07-10: Esperantaj Tagoj de Krakovo, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

09-16: 26-a Internacia Simpozio "Eŭropa Esperanto-Turismo", Bruselo, Belgio (Monda Turismo, Schotlandstr. 73, B-1060 Bruselo)

23-05: Familia Esperanto-Renkontiĝo dum Kristnasko kaj Novjaro, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

27-11: Unua Afrika Kongreseto, Lomé, Togolando (Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

1991

januaro

27-10: Internacia Kurso por Esperanto-Vojaĝgvidantoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

februaro/marto

Internaciaj Esperantlingvaj Kursoj de Akupunkturo, Bydgoszcz, Pollando: 3-foje po du semajnoj en februaro kaj marto, sub gvido de ĉina fakulo Zhu Bin (Esperantotur, adreso supre)

majo

03-05: 12-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre; kun antaŭkongreso, 1-3 majo, kaj postkongresa vojaĝo tra Pollando, 5-9 majo)

05-12 kaj 12-19:

Internaciaj Tenisaj Feriadoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

junio

30-14 julio:

Internacia Pedagogia Kurso por Esperanto-Instruantoj, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, adreso supre)

Oficiala informilo

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimуме \$100): Finnlando: Helvi Jaakkola; Liisi Oterma; Tapio Sormunen. FR Germanio: Heinrich Nischwitz. Japanio: Nobuo Sakurai. Kanarioj: Kristina Krause de Goralski; Larğa Adomski; María Pi Maynar. Usono: Alfred Unterberg; Alex Tate; Thomas H. Goodman; Hiram Elwin Reed; Robert A. Swenson. SUBTENANTOJ (minimуме \$25): Aŭstralio: Jean A. Lehane. Belgio: Stella De Weerd. Brazilo: Cleber de Moraes Lemos. Finnlando: Hemmo Tietti; Martti Pennanen; Terttu Österman; Veera Tietti. Francio: Paul Coulot. Meksikio: Julie L. Regal. Nov-Zelando: Jeannie Wilson. Usono: David C. Halley; Douglas E. Rogers; Dorothy Holland-Kaupp; Maya Kennedy; Pauline Ledeen. [Forpasinta]: Akiko Ŭusink-Nagata. AMIKOJ (minimуме \$10): Aŭstralio: John B. Moore; D-ino M.E. Furness; T. Elliott. Finnlando: Aappo Kurikka; Lauri Mustonen; Anna Selonen. FR Germanio: Esperanto-Grupo Nürnberg; Richard Wluka. Israelo: Andreo Šalamon; Cvi Löwenkopf. Nederlando: Robert Moerbeek. Norvegio: Elna Matland; Sigmund Kveim. Nov-Zelando: G.M. Sutton. Svedio: Amy Nilsson. Usono: Frederik J. Belinfante; Richard Cherniak; Charles Nelson; John T. Dale Jr.; Enrique Ellemberg; Edward E. Reynolds; Adrian Hughes; Philip Chenoweth; Ronald J. Glossop; Werner Simon. KLUBO 777 (minimуме \$777): Usono: Humphrey Tonkin.

PATRONOJ DE TEJO 1990

Aŭstralio: Max Wearing. Belgio: Elvire De Coene; Grégoire Maertens; Stella De Weerd. Britio: Ian Jackson; Charles Alan Shrivess; Patricia C. Sinclair; M. Tresidder. Bulgario: Vasilka Vassileva. FR Germanio: Franz Knöferl; Günther Becker; Maria Vitalyos; Thomas Bormann. Francio: Barbara Despiney; Denis Flochon; Daniel Doye; Emmanuel Chicot; Emile Mas; Fernand Boyet; Henri Boyet; Henri Roy; Raymond Despujols; Richard Cash; Frato René-Jean Marmou; Raymonde Perault; Renée Triolle; Daniel Reynaud. Hispanio: Miguel-Angel Altuna Aspiazu. Israelo: Jehoŝua Tilleman. Italio: Ada Fighiera-Sikorska; Anna Maria Faiella; Clara Gubbioli Carioli; G. Azzi; Michela Lipari Sato; Carla Sfaridini; Sergio Martina; Gianfranco Polerani; Norberto Saletti; Vittoria Spina. Japanio: Joel Brozovsky; Hirotugu Hukumoto; Humiya Morita; Ikuko Yazima-Kitagawa; Bun'iti Isizaki; Zyun'iti Sibayama; Utako Kobayasi; Hiroo Kodama; Yosiki Tatumi. Luksemburgio: Brian R. Moon. Nederlando: Dini Kappert; F.J. Pieterse-Kruger; H. ten Hagen; W.F. Huppertz; J.S. Douma; J. Soeteman; Louise Adelaar; Maud Meijwes; R. Vetter; Willem Spoelder; W.A. Massar-van Diepen; W.L. van Leeuwen. Norvegio:

Margrete Landmark. Nov-Zelando: D.J. Langman. Reunio: Pierre Lelièvre. Svedio: Gunnar Börjesson. Usono: L.A. Walther.

SOCIETO ZAMENHOF 1990

Aŭstralio: L.V. Scott; Ralph Harry. Aŭstrio: Grete Breunlich. Belgio: Eliza Kehlet; Elfriede Ernst; Grégoire Maertens; L. Drèze. Brazilo: Elvira Fontes; Francisco de Souza Almada; Marija Pozder Almada; Álvaro Rabêlo. Britio: E.E. Mallett; Ian Jackson; d-ro John C. Wells; Wilfrid G. Atkinson. Bulgario: Vasilka Vassileva. Danlando: Ejnar Hansen. Finnlando: Harri Tuomola; Irma E. Heikkilä; Juho Pyykönen; Irja Klemola; Liisi Oterma; Osmo Buller; Sirkka Mattlin; Terttu Österman. FR Germanio: Harry Bily; Bruno Vogelmann; Elisabeth Hirsch; Elfriede Kruse; Elise J.F. Woller; Martin Gründler; Helene Hiebel; Helmut Welger; Julie Winter; Helmut

*Dank' al donacoj de
siaj membroj, UEA jam
povis sendi plurajn
centojn da libroj k.a. al
la rumana E-movado.*

Klunder; Marieta Moschner; Jean Prager; Richard Hirsch; Peter Weide; Werner Heinrich; Margarete von Waldowski. Francio: Alexandre Maczkowski; André C.J. Gaillard; Denise Bettman; Emilienne Vanneau; Gaston Waringhien; Gerard Peet; Pierre Guérout; Henri Roy; Jack-André Rousseau; Jean Gibaux; Jean-Paul Beau; Michel Massemin; Odette Bernet; Paul Coulot; Roger Despiney; Julien Ducrocq; Raymonde Perault. Hispanio: José Franquesa Solé; Josep Castelltort. Irlando: Maire Mullarney. Italio: Clara Gubbioli Carioli; Medardo Biagi; Michele Mariano; Vittoria Spina. Japanio: Iwao Katô; Kyôhei Nakazima; Saburô Yamazoe; Wilhelm Schmid; Kôiti Simizu; Syooiti Satoo; Takeo Sugano; Toyozo Nisikawa. Jugoslavio: Jožica Židanik. Kanado: Edward William Woodruff; Stevens T. Norvell Jr.; W.D.B. Hackett. Luksemburgio: Brian R. Moon. Meksikio: Julie L. Regal. Nederlando: Dini Kappert; Evert J. Woessink; Mag. G.F. Makkink; Joaquim Calado; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; Louise Adelaar; H.C. Luijke; Maud Meijwes; P.H. Damsté; Ru H. Bossong; Robert Moerbeek; S.A.K. van der Zee; Simon P. Smits; W.A. Verloren van Themaat; W.C. Keizer; Willy Keizer-Rosenkrantz. Norvegio: Kjell Peder Hoff; Tamiko Kaŭakami-Nielsen; Margrete Landmark; Olav Reiersøl; Maj Vidar Vik. Nov-Zelando: D.J. Langman; Jeannie Wilson. Svedio: Amy Nilsson; Bertil Bengtsson; Gunnar Börjesson; Sten Axel Broman; Birger Viggen; Gunnar Gällmo;

Gustav Nygård; Harald Andersson; Henrik Karlsson; Inga-Maj Lindkvist; Jim Hornö; Karl G. Lennart Lagerkrantz; Leif Holmlund; Nils Gustav Johansson; Nils Olsson; Olle Olsson; Tomas Jansson; Tore Johansson; William Malmsten. Svislando: Furio Gabbrielli. Usono: Alfred Unterberg; Frederik J. Belinfante; Bruce Arne Sherwood; Charles R.L. Power; Charles W. Tustin; David Wolff; Dorothy Holland-Kaupp; Gigi Harabagiu; Gertrude Novak; Thomas H. Goodman; Humphrey Tonkin; James Richard Spriggs; Lucille C. Harmon; Margaret L. Barkley; Pauline Ledeen; Robert A. Swenson; Sidney S. Culbert; William R. Harmon; William H. Schulze; Julius Balbin. [Forpasinta]: Akiko Ŭusink-Nagata.

DONACOJ 1990 (gld.) ĝis la 30-a de aprilo

FONDAĴO AFRIKO: Belgio: Klubo 100: 282,26. Britio: T. Fraser 68,49. Finnlando: T. Sormunen 200,00. Francio: J. Vincent 164,74. Italio: G. Zanotto 94,00. Nederlando: B.M. Slösser-Bresler 50,00; IJK-Kerkrade 449,50. Sumo ĉi-jara: 2194,13.

FONDAĴO AZIO: Francio: J. Vincent 164,74. Sumo ĉi-jara 195,47.

FONDAĴO CANUTO: Finnlando: T. Grundström 19,05; E. Dahlman 13,82. Kanado: Prof.P. Collinge 47,61. Nederlando: B.M. Slösser-Bresler 50,00. Sumo ĉi-jara 4642,79.

ĜENERALA KASO: Francio: R. Lemaire 332,56. Nederlando: J.C. Rapley 25,00; anonime 112,00; anonime 78,51. Svedio: M. Ahlström 31,02; L. Nordenstorm 100,00. Diversaj malgrandaj 11,21. Sumo ĉi-jara 1811,65.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: B.M. Slösser-Bresler 50,00. Sumo ĉi-jara 50,00.

RUMANIO: Britio: M. Boulton 100,00. M. McClelland 200,00. Finnlando: T. Sormunen 200,00; H. Tietti 78,60. FR.Germanio: M. Vitalyos 200,00. Hispanio: A. Verdu 155,00. Irlando: M. Mullarney 35,00; Girvan McKay 50,00. Nederlando: N.J.v.Iperen-de Vries 25,00; Fam. Bossong 17,46; J.M.v.Hulten 21,00. Svedio: K. Fossevall 100,00; S. Sundin 100,00. Usono: M. Kennedy 52,62; R.Lee Campbell 178,62. Sumo ĉi-jara 1763,30.

FONDAĴO WÜSTER: anonime: 1101,40; anonime 1111,15. Finnlando: E. Järvinen 47,63. Sumo ĉi-jara 7597,07.

ESPERANTO-CENTRO BIAŁYSTOK: Britio: A.C.E.Childs 70,80. Usono: M. Kennedy 43,84. Sumo ĉi-jara 222,59.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



Unua Afrika Kongreseto

La definitiva programo, malpli longa kaj malpli kosta ol tiu anoncita en aprilo, tamen provizos neforgeseblajn spertojn al la partoprenantoj.

dec. 27 Flugo Parizo-Lomé (Togolando)
dec. 28-jan. 2 Kongresa programo en Lomé
jan. 2-10 Ekskursvojaĝo per aŭtobuso (eble ankaŭ per ŝipo) tra Benino, eble Niĝerio, Ganao, ĝis Ebura Bordo
jan. 11 Reflugo Abidjan-Parizo

La prezo, 3500 gld., inkluzivas komfortan loĝadon kaj veturadon, plenan programon kaj solidaran pagon por subvencii la partoprenon de afrikanoj, sed ne manĝojn, vizojn, vakcinojn ktp. Por ebligi plej bonan antaŭplanadon, bonvolu anonci vin kiel eble plej frue al la Centra Oficejo de UEA.

Esperanto tutmondiĝas. Spertu tion mem.

Se vi havas malmulte da tempo, se vi ne povas viziti lingvokurson, se vi mem volas difini vian rapidecon en la lernado, partoprenu la

Internacian Korespondan Lingvokurson.

La partoprenkotizo diferencas laŭ la jara nacia enspezo. La kotizo estas pagenda post la unua taskfolio al la konto de Hungara Esperanto-Asocio ĉe UEA heaa-l, aŭ ĉe Magyar Nemzeti Bank/Magyar Eszperantó Szövetség (Hungara Nacia Banko/Hungara Esperanto-Asocio).

**Pliaj informoj ĉe Hungara Esperanto-Asocio,
Pf. 193, H-1369 Budapeŝto.**

TIUN ĈI AVENTURON ANKAŬ VI DEVAS TRALEGI



En tiu ĉi broŝuro Gbeglo Koffi rakontas la aventuron de Kuturu, kiu la unuan fojon vojaĝas en grandan urbon. Ridiga, bela kaj leginda, *Mi vizitis grandan urbon* estas originala verko de togolanda esperantisto.


Ĝenerala distribuanto por revendistoj kaj libroservoj kun triona rabato:

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 11-1105
70.084 Brasília - DF, Brazilo

La libro mendeblas ĉe UEA: prezo 10,50 gld.

LA KOLONOJ DE NIA KULTURO



Al ĉiu serioza esperantisto ne rajtas manki la kvar aperintaj verkoj en la Jubilea Kolekto de UEA:



- **Esperanta antologio. Poemoj 1887-1981.**
Red. William Auld. Rotterdam: UEA, 1984 (2-a eld.). 12+888p. 22cm. Ilus. Bind. Jubilea Kolekto n-ro 1. Pli ol 850 originale verkitaj poemoj de 163 poetoj donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto. 60,00 gld. ③
- **Plena analiza gramatiko de Esperanto.**
K. Kalocsay, G. Waringhien. Rotterdam: UEA, 1985 (5-a eld.). 599p. 22cm. Bind. Jubilea Kolekto n-ro 2. La plej detala kaj fidinda priskribo kaj preskribo de ĝusta Esperanto. 48,00 gld. ③
- **Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj.**
Gaston Waringhien. Rotterdam: UEA, 1989 (2-a reviziita eldono kun apendico). 452p. 21cm. Bind. Jubilea Kolekto n-ro 3. Klasika studaro pri la fontoj kaj strukturo de Esperanto. 48,00 gld. ③
- **Trezoro. La Esperanta novelarto.**
Div. aŭtoroj. Red. R. Rossetti kaj H. Vatré. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1989. 948p. 21cm. Duvoluma. Jubilea Kolekto n-ro 4. Riĉa kolekto de noveloj, romanfragmentoj kaj aliaj prozaĵoj ĉerpitaj el unu jarcento da originala verkado. 69,00 gld.

Mendu de la Libroservo de UEA.

③ = triona rabato ekde tri ekzempleroj



La ponto el libroj

De tridek jaroj, la Serio "Oriento-Okcidento" de UEA konstruas por ĉiu esperantisto pontetojn al aliaj mondoj.

Rabindranath TAGORE

Malsata ŝtono

Sep rakontoj pri la bengalaj moroj kaj homtipoj.

El la bengala trad. L. Sinha. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1961. Ilus. 128p. 21,00 gld.

MORI Oogai

Rakontoj de Oogai

Kvar noveloj de verkisto, kiu komence de la 20-a jarcento rolis ponte inter la literaturoj de Eŭropo kaj Japanio.

El la japana trad. diversaj. Tokio: Japania Esperanto-Instituto, 1969 (represo). 117p. 19,80 gld.

Dante ALIGHIERI

La Dia Komedio

Vasta rigardo al la homa vivo kaj la homa spirito, la fonda verko de la itala literaturo, en senrima versa traduko, riĉe ilustrita.

El la itala trad. G. Peterlongo. Milano: Edizione S.I.E.I., 1963. Dua eldono, 1979. Ilus. de S. Botticelli. 55+709p. 126,00 gld.

Elias LÖNNROT

Kalevala

Nacia epopeo de la finna popolo, kun sorĉaj rakontoj kaj rava vortmuziko.

El la finna trad. J. E. Leppäkoski. Helsinki: E-Asocio de Finnlando, 1985. Ilus. 368p. 45,00 gld.

José HERNANDEZ

Martín Fierro

"Cignokanto" de la argentina gaŭĉo, formortanta inter la primitiva kaj civiliza mondoj.

El la hispana trad. E. Sonnenfeld. La Laguna: J. Régulo, 1965. Belliteratura Serio 26. 289p. 24,00 gld.

William SHAKESPEARE

Reĝo Lear

Eterna tragedio de homo, kies bezono de amo kaj fido pelas lin al pereco.

El la angla trad. K. Kalocsay. Rotterdam: UEA, 1966. 156p. 9,00 gld.

IHARA Saikaku

Kvin virinoj de amo

Frape detalaj kaj senpudoraj rakontoj pri la komercista klaso en Japanio de la 17-a jarcento.

El la japana trad. Miyamoto Masao. Tokio: Libroteko Tokio, 1989 (2-a eldono). 159p. 31,80 gld.

Charles BAUDELAIRE

La spleno de Parizo

La kolektitaj prozpoemoj de aŭtoro, kies aŭdaca malkaŝemo enkondukis revolucion en la eŭropa literaturo.

El la franca trad. P. Lobut. København: Koko, 1967. 122p. 16,80 gld.

TANIZAKI Zyun'itirô

El la vivo de Syunkin

Du dramoj, du noveloj de fekunda verkisto, kies ĉefa temo estis la beleco kaj strangeco de la homa seksimpulso.

El la japana trad. Miyamoto Masao kaj Isiguro Teruhiko. Oosaka: Pirato, 1968. 145p. Broŝurita: 14,10 gld. Tolbindita: 19,50 gld.

La Nobla Korano

Dulingva eldono de la sankta libro de Islamo.

El la araba trad. Italo Chiussi. Teherano, 1977 (fotorepreso). 20+667p. 66,00 gld.

Italo CHIUSI

Je la flanko de la profeto

Klera kaj pia prezento de Islamo kaj ties profeto Muhammad.

Antverpeno: TK, 1978. Ilus. 362p. 30,00 gld.

Henrik IBSEN

Brand

Versa dramo, laŭ iuj la pinta verko de Ibsen, pri kuraĝa, sinofera sed senkompata pastro.

El la norvega trad. E. A. Haugen. Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1968. Belliteratura Eldonserio 33. Ilus. 320p. Broŝurita: 21,00 gld. Tolbindita: 33,00 gld.

Luis VAZ DE CAMÕES

La Luzidoj

Ekscita eposo pri la portugala popolo kaj precipe la navigado de Vasco da Gama en Afriko kaj Azio.

El la portugala trad. L. H. Knoedt. Chapecó: Fonto, 1980. Ilus. 464p. 57,00 gld.

Harry MARTINSON

Aniara

Moderna eposo kiu el multaj diversaj anguloj prilumas homajn emojn kaj dilemojn, sur la fono de fiaskinta kosmovojaĝo.

El la sveda trad. W. Auld kaj B. Nilsson. Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1979. 174p. 30,00 gld.

William SHAKESPEARE

La sonetoj

La alia flanko de la granda dramisto: poemoj pri amo, arto kaj la senkompata forfluado de la tempo.

El la angla tradukis W. Auld. Pizo: Edistudio, 1981. 326p. 40,20 gld.

Tutmonda sonoro

La hungara majstro Kalocsay prezentas 581 poemojn de 185 poetoj en spirhaltiga resumo de la mondliteraturo.

El diversaj lingvoj trad. K. Kalocsay. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1981. Duvoluma. 664p. 66,00 gld.

Adam MICKIEWICZ

Sinjoro Tadeo

Epopeo pri la lando kaj vivo de la malnova pola-litova nobelaro. La traduko ludis gravan rolon en la evoluo de Esperanto.

El la pola trad. Antoni Grabowski. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1986. 333p. 24,00 gld.

Elpafu la sagon

Unika kolekto de buŝa poezio, plejparte de popoloj alie forestantaj el la Esperanta kulturo.

El diversaj lingvoj trad. T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1983. 188p. Broŝurita: 27,00 gld. Tolbindita: 36,00 gld.

J. W. von GOETHE

La suferoj de la juna Werther

Sentimentala leterromano, kiu lanĉis la karieron de Goethe kaj trovis grandan eĥon en la posta eŭropa literaturo.

El la germana trad. R. Haupenthal. Heckendalheim: Berthold Faber, 1984. 92p. 48,60 gld.

INOUE Yasushi

Loulan kaj Fremdregionano

Du historiaj noveloj pri antikva Turkestano kaj la dinastiaj kaj kulturaj konfliktoj tie.

El la japana trad. M. Masao. Tokio: Japania Esperanto-Instituto, 1984. 96p. 29,70 gld.

CHUN-CHAN Yeh

Montara vilaĝo

Romano pri la ĉina revolucio de 1927, vidita el la perspektivo de ordinara kamparanoj.

El la angla trad. W. Auld. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 264p. 16,50 gld.

Federico GARCIA LORCA

Sanga nupto kaj

La domo de Bernarda Alba

Du el la brilaj dramoj de granda humanisto, plenaj je homaj konfliktoj kaj pasio.

El la hispana trad. M. Fernández. Madrido: Ediciones La Misma, 1987. 229p. 22,80 gld.

ERASMO de Roterdamo

Laŭdo de l' Stulteco

Ŝlosila verko el la eŭropa transiro al humanismo: satira, sprita argumento por la valoro de la homaj pasioj.

El la latina trad. Gerrit Berveling. Rotterdam: UEA, 1988. 111p. 30,00 gld.

Aŭstralia antologio

Zorge kunmetita trarigardo de la poemoj, kantoj, noveloj, romanoj kaj eseoj de Aŭstralio.

Red. A. Towsey. El la angla trad. diversaj. Pizo: Edistudio, 1988. 431p. 75,00 gld.

Ĉiuj titoloj estas haveblaj je la indikita prezo de la Libroservo de UEA. Nehaveblaj estas tri eroj nemenciitaj: Jean-Paul SARTRE, *La naŭzo* (trad. R. Bernard); KAWABATA Yasunari, *Neĝa lando* (trad. Konisi Gaku); kaj Ivan A. KRILOV, *Elektitaj fabloj* (trad. S. G. Rublov).

Transpaŝu ĝin kun UEA.